
# KOSMOS

Revuo de Martinus-Instituto




Simbolo n-ro 17. Reenkarniĝo, cikloj kaj sezonoj

N-ro 1, 2024 Esperanto

## Enhavo


La Martinus-movado – ĉu ĝi havas nomon? ....... 2
Pensoj ĉirkaŭ pasko ....... 3
Klarigo pri simbolo n-ro 17 ....... 9
Reenkarniĝo, cikloj kaj sezonoj ....... 9
Esperanto – la internacia mondlingvo - parto 1 el 3 ....... 16
Libera Artisto de Tatjana Auderskaja ....... 22

## La Martinus-movado – ĉu ĝi havas nomon?

**Demando:** Kial la “Martinus-movado” ne havas konvenan nomon, povas esti karakterizata samkiel aliaj spiritaj movadoj, kiel Teosofio, Antroposofio, Atestantoj de Jehovo ktp.?

**Martinus respondas:** Ĉirkaŭ mia spirita laboro neniel en iu ajn formo ekzistas nek iam ekzistos asocia, sekta aŭ religia formiĝo kun statutoj kaj reguloj, kun sakramentoj kaj baptaj ceremonioj k.s. Tiel ne troviĝas iu ajn “movado” al kiu doni nomon.

Ke mia spirita laboro ricevas pli kaj pli da interesitaj studantoj kaj legantoj ja ne signifas, ke pro tio eblas nomi ilin organizita religia komunumo. Same malmulte oni konsistigas paroĝon, sekton aŭ eklezion, per studado aŭ legado de sciencaj verkoj de iu ajn alia verkisto. Mia tuta spirita laboro celas nur esti instruado aŭ manifestado de scio en formo de analizoj de la mondbildo kaj per tio riveli la premisojn de la proksimula amo aŭ la humana vivmaniero aŭ sinteno, kiu identigas la homon kun la mondpaco. El tio sekvas ke mia laboro, pro sia intelekta strukturo, neniam ajn povos fariĝi religio bazita sur kredo. Male, ĝi povas ekskluzive fariĝi nur lernejo, edukejo, institucio por gvidado kaj edukado pri vivscienco, per kiu la studanto povas kontaktiĝi kun sia dieca transformiĝo de besto al “homo laŭ la bildo de Dio simila al li”.

Tiu mia laboro sekve estas por absolute ĉiuj verserĉantoj tute sendependa de iu ajn religio, nacio aŭ raso al kiu ili apartenas. Miaj analizoj estas samkiel ĉiu ajn alia scienco absolute neŭtralaj kaj nepartiaj.

Ĉar mia spirita laboro do estas manifestaĵo de, kaj gvidado en la eternaj analizoj de la mondbildo, ĝi tute simple karakterizeblas kiel kosma scienco, kiu siavice egalas al spirita scienco, samkiel la studantoj de tiu spirita scienco esprimeblas nur kiel spiritaj esploristoj. Esprimi mian spiritan laboron kaj ties interesitajn esploristojn per aliaj terminoj povas esti nur esprimo de plena miskompreno.

*De revuo de Martinus-Instituto, Kosmos n-ro. 1, 1989*

## Pensoj ĉirkaŭ pasko

### 1. La evento de la pasko estas mistero

Ĉie en la kristana mondo la homoj nun solenos la paskon. Tial mi ŝatus iom rakonti pri speciala flanko de tio, kio kaŭzas, ke la homoj solenas ĝuste tiun eventon. Por la granda parto de la kristana mondo la paskofesto estas memorfesto pri evento, kiu okazis antaŭ baldaŭ 2000 jaroj en Palestino. Tiu evento certe estis el tre aparta speco, se oni plu rememorigas ĝin post tiom da jarcentoj. En la kristana religio ĉie en la mondo oni predikas, mesas, kantas, sonigas sonorilojn ktp. dum la pasko same kiel dum la aliaj festoj, kristnasko kaj pentekosto. Sed la pasko estas ne nur rakonto pri evento, kiu okazis antaŭ tempo longe pasinta. La paska evento estas mistero al la nefinita homo. Pro tiu kaŭzo la evento ne estas delonge forgesita. Tio sama validas, kiel antaŭe dirite, ankaŭ por la du aliaj festoj, kristnasko kaj pentekosto. Ankaŭ ĉiu el ili estas esprimo de aparta mistero. En la preĝejoj tutmonde oni rakontas nur pri ekstera fizika okazaĵo, kiu okazis kiel dirite antaŭ tre longe. Ili ĉiuj konas la rakonton pri la krucumo, morto kaj resurekto de Kristo. Sed ili konas ĝin nur kiel pure fizikan okazaĵon, sorto kiu trafis perfektan homon pro netoleremo kaj ĵaluzo de la tiamaj religiaj aŭtoritatoj. Kaj ŝajne estas neniom da mistiko en tia evento. Estas multaj homoj krucumitaj simile kiel Jesuo. La krucumo estis ordinara ekzekutmetodo tiutempe. Ĉiuj apostoloj de Jesuo, escepte de Johano, ankaŭ estis krucumitaj aŭ ekzekutitaj. Pri ĉiuj tiuj aliaj, same krucumitaj, neniu mistiko estiĝis.

### 2. Kial estiĝis mistiko pri la krucumo de Jesuo

Kio do kaŭzas, ke estiĝis mistiko pri la krucumo de Jesuo kaj ne pri la ekzekuto de la aliaj homoj? – Al tio oni certe respondos, ke estis tial ke li estis "filo de Dio". – Sed kiel do oni ekhavas la ideon kredi, ke li estis la "filo de Dio"? – Tiel estis, ĉar ligiĝis al liaj naskiĝo kaj kondutmaniero, kiel ni vidos, eksterordinare grandaj kosmaj fortoj, kiuj per li formiĝis en vortojn kaj agojn.

### 3. La terglobo estas mikrokosma areo en tiu organismo, kiun ni nomas "la universo"

Por kompreni tiujn kosmajn fortojn necesas ekkompreni, ke la universo estas unu sola vivanta makrokosma organismo. En tiu la sunoj, planedoj kaj galaksioj estas organikaj sistemoj, kiuj laboras kaj akcelas la vivofortojn kaj distribuas tiujn tiamaniere, ke ĉiu planedo, ĉiu vivsistemo, ĉiu vivanta estulo estas ĝuste ŝargata per tiuj kosmaj vivofortoj laŭ sia bezono. Precize same okazas interne de nia propra organismo. Tiu estas en si mem miniatura universo. Estas en ĝi tiom abunde da vivantaj estuloj kiel en la universo ekster ni. Niaj organismoj kaj organoj ja estas sammaniere taskitaj akceli, distribui kaj adapti la vivnutraĵon al ĉiuj tiuj etaj mikroestuloj, tiel ke ilia vivo kaj estado per tio estos gardata. La terglobo kun tiu tuta vivo, kiu troviĝas sur ĝi, do estas mikrokosma areo en tiu granda kaj senfina organismo, kiun ni nomas la universo.

### 4. La fizika kaj spirita nutraĵo de la tero

Sed por povi konservi sian travivad-kapablon aŭ resti vivanta, ĝi bezonas vivnutraĵon. Tiu vivnutraĵo konsistas el du specoj da nutradaj procezoj: la fizika kaj la spirita. La fizikan nutraĵon ĝi ricevas de la suno kaj de la partikloj, meteoroj kaj aliaj fenomenoj en la formo de materioj, kiujn ĝi sumigas en sin kaj digestas per la aer-maro aŭ sia speciala fizika atmosfero. La spiritan nutraĵon ĝi ricevas de spirita kerna sistemo en la centro aŭ interno de nia galaksio.

### 5. La principo de mondoliberigo, la mondsavantoj kaj la kreado de nova kulturo

Tiu kosma nutraĵo estas tio, kio reflektiĝas en la principo de mondoliberigo pere de la estuloj, kiujn ni nomas la "mondosavantoj". Ĉiufoje kiam la tero ricevas tiajn nutroimpulsojn, estiĝas nova evolu-epoko kun pli altaj idealoj. La idealojn formas la menciitaj mondosavantoj, kiuj samtempe enkarniĝas en la homan vivosferon kaj kontaktigas la tiucele maturajn terhomojn kun tiuj novaj idealoj, el kiuj ofte estiĝas nova religio, kiu iom post iom formas fundamenton de tuta nova kultura epoko. Niatempe la novaj idealoj ne formos religion, sed spiritan sciencon, kiu laŭgrade fariĝos la fundamento de monda kulturo, kiu abolos la militon kaj faros el la tuta mondo unu regnon, unu popolon, kaj en tiu regno la Dieco, la senmorteco kaj la amo estas scienco, beleco kaj ĉiutaga kondutmaniero inter ĉiuj homoj surtere.

### 6. La vivpercepto kaj kondutmaniero de Jesuo Kristo

Jesuo Kristo do enkarniĝis en la sferojn de la tero samtempe kun tia kosma mondimpulso. En li estis enkarniĝinta la granda kosma vereco. Li apartenis al tiaj perfekteco kaj evolu-stadio, kiaj ankoraŭ ne ekzistis kiel io ĝenerala valida surtere. Lia regno ne estis de ĉi tiu mondo. Tial lia kondutmaniero estis tute malsimila al tiu de aliaj homoj. Lia hejmloko do ne estis la tero, sed ja sfero de multe pli alta evoluo, ekzistonivelo, sur kiu oni amas sian proksimulon kiel sin mem, kaj kie la idealoj de lia Prediko sur la Monto estas ĝenerale valida memkompreneblaĵo en la ĉiutaga kondutmaniero. Tiel do Jesuo Kristo estis homo el pli alta mondo, kies idealoj kaj vivfundamento estis enkarniĝintaj en li kiel kunnaskitaj kapabloj kaj talentoj dum lia surtera estado. Tial li ne povis ne devii de la terhomoj laŭ vivpercepto, pensado kaj kondutmaniero. La enmonde validanta moralo "okulon por okulo kaj denton por dento" estis al li kondutmaniero tre primitiva kaj malperfekta. Lia kondutmaniero estis ami Dion super ĉio kaj sian proksimulon kiel sin mem kaj sekve ami ankaŭ siajn malamikojn, do kondutmaniero, kiun ankoraŭ hodiaŭ eĉ interne de la tiel nomata kristana mondreligio milionoj da nesciantoj rigardas kiel malnormalaĵon, eble eĉ kiel mensan malsanon.

### 7. La kuraĝo de la mondosavanto

Imagu, kiom da kuraĝo necesis por instrui tian kondutmanieron antaŭ la tiamaj oficiale aprobitaj pastroj kaj skribistoj, kiuj estis la tiamaj specialistoj pri religio, moralo kaj vivkonceptado. Tiuj ja estis totale sensciaj pri la pravigeblo de tia nova moralo kaj vidis en Kristo tre danĝeran estulon, kiu predikadis falsan instruon kaj misinformadis la popolon. La moralo de ilia religio ja estis "okulon por okulo kaj denton por dento". Tial ili opiniis, ke necesas haltigi lin. Kaj tial oni volis ke li mortu. Kaj oni ankaŭ sukcesis krucumigi lin kiel "krimulon", kredante ke nun tiu afero estas solvita. Sed tiel do ne okazis. La krucumo de Kristo ne pasis en forgesiĝon, tiel kiel okazis al tiuj multaj aliaj, kiujn oni krucumis aŭ ekzekutis tiutempe. Kiu konas hodiaŭ la nomojn kaj datumojn de tiuj estuloj? – Sed la nomo kaj kariero de Jesuo estas konata ankoraŭ hodiaŭ kaj brilos kaj sparkos kun ĉiam pliiĝanta gloro, dum la homaro antaŭenglitas en sia evoluo. Estas kvazaŭ la rakonto pri tiu sufero absolute ne povas morti. Jes, milionoj da homoj ankoraŭ dum niaj tagoj memoras ĝin en la formo de la paska festo.

### 8. La mistero de kristo aŭ de la pasko estas solvebla

Kiel okazis, ke ordinara metiisto naskita en malriĉaj cirkonstancoj kaj mortinta juna sukcesis postlasi tian postmortan reputacion, ke milionoj da homoj hodiaŭ, 19 jarcentojn poste, laŭdegas lin kun respektego? – Evidente ĉe Jesuo estis io, kio kaŭzis, ke la homaro ne povis forgesi lin, ne povis lasi lin eĉ post ĝia malhonorigo de li kiel "krimulo" kulpiĝinta por ekzekuto. Grandaj reĝoj

kaj imperiestroj vivis kaj faris grandiozajn agojn laŭ terhomaj konceptoj, sed kiuj honoras ilin hodiaŭ, kaj kiuj niatempe okazigas solenaĵojn por ili? – Sed Kristo, kiu naskiĝis en stalo kaj nur iĝis metiisto kaj estis ekzekutita kiel krimulo, li estas hodiaŭ honorata ĉie en la mondo. Jen kio estas mistera. Ĉu tiu mistero estas solvebla? Jes, la mistero de Kristo aŭ de la pasko estas solvebla kaj absolute ne devas resti mistero al la homoj. Sed ĉu oni komprenos tiun solvon, estas tute alia demando. Tiu, kiu ne povas kompreni la solvon, ja devas daŭre koncepti la eventon de la pasko kiel misteron, se li entute sukcesas ekkredi, ke tia evento iam okazis.

## 9. La malhumana kulturstato antaŭ Kristo

Se oni volas ekkompreni la solvon de la paska mistero, tiam oni devas imagi al si la religian staton, kiu regis ĉe la judoj kaj entute ĉe la homoj de la tero antaŭ la tempo de la persona apero de Jesuo. Tiutempe la homojn dominis aŭ regis treege malhumana kaj kruda vivkoncepto. Estis bona moralo havi sklavojn, militi, konkeri aliajn popolojn kaj iliajn kulturajn trezorojn kaj la popolon mem sklavigi. Ankaŭ en la juda religio oni havis sklavojn, kaj la baza fundamento de la religio kaj sekve en la regado kaj la praktika kondutmaniero do estis ankoraŭ pli malhumana ol la principo “okulon por okulo kaj denton por dento”. Tie estis nenia ajn kompreno de la homa psiko en tia formato, ke oni komprenis, kial la “krimuloj” estas “krimuloj”, kaj tial oni opiniis, ke ili estu tute senindulge punataj, eĉ ekzekutataj, se oni rigardas tion necesa.

## 10. La komenciĝanta kresko de la kristokonscio apud la malhumanaj restaĵoj de la prakulturoj en la moderna monda kulturo de hodiaŭ

Kaj ĉu ne ankoraŭ nun en la 20-a jarcento estas fakto, ke la ondoj de tiu vivkoncepto ankoraŭ forte regas kadre de la tiel nomata bona politiko, bona etiketo, kadre de la tiel nomata kristana mondreligio? Ĉu ne mortopunoj kaj aliaj punoj, torturo kaj anima dismembrigo ankoraŭ fojfoje okazas? – Tamen hodiaŭ tiu malluma flanko de la vivo okazas samtempe kun komenciĝanta humaneco. Treege multaj homoj en la tuta mondo hodiaŭ malakceptas militi, partopreni murdadon kaj dismembrigon, jes, ili eĉ ne povas partopreni mortigadon de bestoj. Tiuj homoj do kreskis laŭ tute alia mensa ondolongo ol tiu, kiu ĝenerale validas en la tiel nomataj kulturaj ŝtatoj. Kio do ĉi tie asertas sin? – Ĉu ne estas ĝuste la komenciĝantaj dispozicioj kaj talentoj por la kondutmaniero de la nova mondkulturo, tiuj kiuj validis en la kondutmaniero, moralo kaj pensmaniero de Jesuo aŭ en la idealoj, kiujn li rivelis al la homoj? Kaj ĉu ne tiu pensmaniero kaj kondutmaniero ĝuste estas io nova en la terhoma vivosfero? – Kaj ĉu tio ne ĝuste estis kosmaj, mensaj fortoj de pli alta mondo? – Kristo tiel estis ia transformilo por la transdono de pli altaj mensaj fortoj el la konsci-sfero de pli alta mondo al komenciĝanta kulturkreo en pli malalta mono. Tiu malsupren-transformado povis esti efektivigita aŭ okazi nur pro tio, ke en la pli malalta sfero troviĝis homoj spirite tiom maturiĝintaj, ke ili estis akceptemaj al pli altaj kosmaj ondokampoj manifestitaj tra la konsci-strukturo de Kristo. Per tiu kontakto la tero do spirite fekundiĝis per la lumantaj idealoj de la pensklimatoj de pli alta mondo aŭ konsci-sfero. Tiuj idealoj do estis adaptitaj al terhomoj, kiuj estis sufiĉe evoluintaj por esti kontaktigeblaj al la diritaj idealoj kaj sekve por inklini lasi tiujn fariĝi la gvidilo de ilia ĉiutaga kondutmaniero.

## 11. Ĝis la kondutmaniero de Kristo estos kondutmaniero de la homoj de la tero, neniel eblos al ili atingi daŭran pacon

Sed tiu konduto ne nur riveliĝis teorie, ĝi riveliĝis ankaŭ praktike. Tial devis okazi la krucumo de la mondosavanto, tiel ke tiu evento povis stari kiel neŝancelebla pruvo de tio, ke tia amo al la proksimulo, kian li predikis, vere povas ekzisti en estulo el karno kaj sango. La ama kaj pardonema kondutmaniero, kiun Kristo rivelis, efektive fariĝis la modelo de tiu kondutmaniero, kiu al ĉiu ajn estulo estas la absoluta celo de la vivo. Kaj ĝis tiu kondutmaniero estos memkomprenebla ĉiutaga kondutmaniero inter la homoj de la tero, ili neniam ajn atingos veran travivadon de absoluta kaj daŭra paco. Sur la kruco, meze de la plej malfacilaj suferoj, kiuj povas okazi al homo, Kristo montris, ke li amas siajn malamikojn kaj li preĝis, ke ili nenion suferu pro tiu perforta mortiga ago al li. Li atentigis, ke ili ne scias, kion ili faras.

## 12. La neceseco de la krucumo

Sed li ankaŭ per siaj kondutmaniero kaj preĝo por siaj ekzekutistoj rivelis, ke li travivis la Diecon de la universo estas kiel sian veran, kosman patron. Li preĝis “Patro, pardonu ilin; ĉar ili ne scias, kion ili faras.” Per tio revelaciiĝis, kiamaniere homoj de pli alta konsci-sfero travivas la Diecon kiel realecan efektivaĵon aŭ fakton. Travivante la Diecon kiel sian patron li ne konis timon – ankaŭ ne pri la krucumo, kiam klariĝis al li, ke la volo de Dio estas, ke li akceptu ĝin. Tia mensa stato devis esti revelaciita al la homoj, se ili entute kapabliĝu kredi la ekziston de tia amo, kiu povas kaŭzi, ke estulo povas libervole lasi sin esti krucumita kaj morti, por ke al aliaj estuloj per tio riveliĝu la vojo al la lumo, per kiu ili feliĉiĝos kaj unuiĝos kun Dio.

## 13. La kondutmaniero de Kristo estis enplantenda en la menson kaj vivosferon de la terhomoj

Tiu sorto de Kristo do estis tia tre grava ludo inter la ĉielaj kaj teraj fortoj, kia ĉiam estos la efektiviĝo de la mondliberiga principo. La kreado de kontakto inter tiuj du malsamspecaj fortoj efikis, ke la kosmaj fortoj en la formo de kosmaj idealoj fariĝis enplanteblaj en la konscion de la terhomaro. Kaj okazis pro la kontribuo de tiu pli alta mondo malantaŭ la vivo kaj kondutmaniero de Jesuo, ke lia kariero ne perdiĝis en forgeson antaŭ longe malkiel tiu de ĉiuj aliaj estuloj krucumitaj aŭ ekzekutitaj, sed estas nun rememorigata per festoj en la tuta mondo. En li estis enkarniĝinta la totale perfekta kondutmaniero. Ĝi devis esti enplantita en la homan mentaliton aŭ vivosferon por tie kreski kaj perfektigi la homojn.

## 14. Certa areo de la monda kulturo komencis iri laŭ la piedsignoj de Jesuo

Kaj ni ja ankaŭ vidas, ke certa areo de la terhoma kondutmaniero en la kulturaj ŝtatoj komencis iri laŭ la mensaj piedsignoj de Jesuo. Kion signifas ekzemple la grandaj modernaj hospitaloj, sanatorioj kaj aliaj formoj de malsanulejoj? – Ĉu ne tio estas la parabolo pri la korfavora samariano efektivigita en la ĉiutaga vivo? – Kio estas ĉio, kio apartenas sub la nocio “prizorgo”? Ĉu tio ne estas la helpo de la ŝtato al senmonuloj, kiuj pro maljuniĝo, malsaneco kaj mizero ekhavis bezonojn? – Ĉu tio ne estas ĝuste la plenumiĝo de la principo en la vortoj de Jesuo tie, kie li diras, ke tiu, kiu havas du tunikojn, donu al tiu, kiu neniun havas? – Ĉu ne estas ankaŭ ŝtatoj, kiuj abolis la mortpunon? – Tio ja tamen estas paŝo al la plenumo de liaj vortoj pri tio ke oni alturnu la dekstran vangon, kiam oni estas batata sur la maldekstran aŭ inverse, kvankam tiu plenumo ne estas totala plenumo de tiu lia ordono. La abolo de la mortpuno tamen estas komenciĝanta tendenco en la supervenko de la kruda primitiva aŭ pagana flanko de la jura kaj puna konceptaro de la homoj. Tiu tendenco plu kaj plu kreskos laŭ la piedsignoj de Jesuo. Iam la homoj sukcesos forigi ĉiujn formojn de “puno”, ĉar tiuj efektive estas identaj al “venĝo”, kiu ankaŭ neniel povas konsistigi veran kristanismon. Tio kompreneble ne signifas, ke oni ne protektu sin kontraŭ la vivdanĝeraj bestaj naturoj, kiuj povas efektiviĝi en iu proksimulo kontraŭ oni mem. Sed tiu protektado ne okazu ĉu en ekscititeco, ĉu en malamo, ĉu en venĝo. Tiu protektado montriĝas en siaj unuaj komencoj en la modernaj polica kaj jura sistemoj, sed ĝi ankoraŭ estas longe for de tiu celo, kiun ĝi iam atingos.

## 15. La mondosavanto kiel modela estulo por la kreado fare de Dio de “la homo en sia bildo”

Ni do tiel vidas ĉi tie, ke nun prezentiĝas en la homaro granda parto de la kristokonscio aŭ tiu konscio, kiun Kristo rivelis teorie en siaj paroladoj al la disĉiploj kaj la popolo kaj konfirmis praktike per sia kondutmaniero pere de sia krucumo. Per tio li fariĝis por la mondo rivelita modela konscio kaj lia ecaro iĝis modela kondutmaniero. Kaj tiel liaj am-idealoj rivelitaj per liaj parolado kaj kondutmaniero estas la kerno de ĉia kristanismo tutmonde. Liaj pensmaniero kaj kondutmaniero, bazitaj sur la Dieco kaj la amo, estas manifestitaj en la mondo kiel ekzemplo de la perfekta homo en la bildo de Dio kaj simila al li. Tiu konsci-stato, tiu intima rilato al la origininto de la universo, la eterna patro de ĉiuj vivantaj estuloj, estas tio, kion la Dieco celas per la evoluado, sortokreado kaj travivado de mallumo fare de la vivantaj estuloj. El tiu mallumo ĉiuj vivantaj

estuloj devas resurekti por povi vivi konscie en la Dieco kaj kun ĝi en la plej altaj lumsferoj de la vivo-traspertado.

## 16. La fundamenteco de la resurekto de Kristo

Tra la vivo de la Mondosavanto ni vidis, ke li resurektis el malserena teruro aŭ infero de la mallumo kaj suferoj aŭ krucumoj por sparki, lumi kaj brili per la spirito de Dio sur la tutan mondon. La fundamenteco de lia resurekto estas ne nur tio, ke permesiĝis al liaj disĉiploj kaj kelkaj el liaj aliaj karaj geamikoj de lia fizika vivo revidi lin post lia krucumo aŭ lia fizika morto, vidi lin kiel lumantan kosman korpon en kelkaj mallongaj kunestadoj. Tiu ilia travivaĵo relative rapide forgesiĝus, se tiu revelacio de lia lumanta, kosma korpa stato estus ĉe li la sola senmorteco, kiu ekzistis post lia fizika morto. Tio, kio transvivis la krucumon aŭ la fizikan morton, estis ne nur Kristo mem, sed la senmorta, dia spirito de saĝo kaj amo, kiu per li enkarniĝis en fizikan materion en la formo de liaj diaj vortoj kaj sentencoj, lia Prediko sur la Monto kaj aliaj paroladoj al la popolo kaj al la disĉiploj. Kreante tiujn vortojn, akcentitajn per lia dia kondutmaniero, li nun preskaŭ 2000 jarojn post sia fizika morto paroladis al milionoj kaj milionoj da homoj kaj tiel kreis la komencon de tuta nova mond-epoko. En tiu epoko ĉiuj homoj sur la tero estos benitaj.

## 17. Kial la antaŭdiroj de Kristo pri la venonta lumepoko ne efektiviĝus tiel same kiel liaj antaŭdiroj pri la mallumepoko de la homaro aŭ la tago de la lasta juĝo?

Li antaŭdiris ankaŭ tion, kio antaŭe okazos ĝis tiu epoko. Venos terure mallumaj tempoj, ia stato de tago de la lasta juĝo aŭ "krepusko de la dioj", dum kiu la diablo furiozegos en sia tuta potenco. Estos militoj kaj onidiroj pri militoj. Popoloj sin levos kontraŭ popoloj. Religieco kaj kulto estos malrespektataj, eĉ persekutataj. Kaj kion do la homaro travivas dum nia jarcento? – Ĉu ne tio estas ĝuste la plenumiĝo de liaj antaŭdiroj? – Kio ne estas la mortado sur la batalkampoj, en la koncentrejoj aŭ torturejoj, en la gasĉambroj, en la raketoj aŭ atombombaj eksplodoj? – Ĉu tio ne estas la epoko de la lasta juĝo pure kaj propre, gvidata kaj diktata de "diablokonscio"? – Sed kiam la mensa mallumo, kiun Kristo antaŭdiris, tiamaniere plenumiĝas antaŭ niaj okuloj kiel faktoj, kial do ne la granda mensa lumo, kiun li ankaŭ antaŭdiris, ne plenumiĝus sammaniere, fariĝus faktoj por la homoj? – Kion li do antaŭdiris tiukampe? – Li esprimis tiun preman tempon kiel "la lastajn tempojn". Ke tie ne la "mondofinon" aŭ la pereon de la tero li esprimas, fariĝas fakto per liaj antaŭdiroj de tio, kio okazos sur la tero kaj plukondukos la homojn, kiam tiuj "lastaj tagoj" estos pasintaj. Li anoncas ĝuste grandan lumepokon, kiu venos por la homoj. Liaj vortoj, tio estas: la absoluta kaj eterna vero en ili, estos aŭditaj kaj konataj de ĉiuj homoj sur la tero. Kaj estos unu grego kaj unu paŝtisto. Tio siavice signifas, ke ĉiuj popoloj de la tero havos nur unu solan religion, nome la eternan veron kiel sciencon kaj sekvontan el ĝi totale perfektan kondutmanieron.

## 18. Kial la altaj idealoj de kristanismo reduktiĝas aŭ ŝanĝiĝis al nura mezaĵo inter mallumaj paganaj kaj totale perfektaj kosmaj idealoj

Kiel scienco la religio ne povas esti juda, nek budhana, islama, hindua, nek alimaniere naciece karakterizita. Jes, eĉ ne kristanismo ĝi povas esti tiusence, kiel ĝi hodiaŭ en sia eklezia predikado devias de la spirito kaj koro de sia fondinto. Tio ĉi ne estu kritiko de kristanismo, nek de la aliaj mondaj religioj. Ties altaj diaj idealoj nature tiutempe estis nek kompreneblaj nek plene akcepteblaj de la ankoraŭ primitivaj kaj paganaj popoloj, al kiuj ili estis donitaj. La diritaj idealoj tial estis reduktitaj al malpli radianta brilo, tiel ke ili povis krei mezaĵon aŭ transiran stadion inter la altaj, puraj idealoj kaj la kutimaj paganaj idealoj. Ne per milito, atombomboj, raketoj, gasĉambroj kaj torturejoj oni plenumas la purajn kaj plej altajn ekzistantajn idealojn de la kristanismo. Ne estas glorinda plenumo de la kristanismo, ke ĝiaj nacioj kaj ŝtatoj ĝis nun estis la plej grandaj militpopoloj kaj subpremantoj de aliaj popoloj sur la tero.

## 19. Kion antaŭvidis la mondoliberiganto

Estas ne strange, ke Kristo, vidante per sia kosma konscio ke lia pura instruo ne venkos ĝis post la tago de juĝado aŭ "krepusko de la dioj", kiu montros al la homoj tiun inferon, tiujn mortigajn

mensajn fortojn, tiun diablokonscion, kiu estiĝos en mondo, kie oni dum jarmiloj krucumos liajn idealojn ignorante lian predikadon pri Dio kaj la postulatan amon al la proksimulo, – ke li komprenis, ke tiu lia enkarniĝo je la fizika nivelo ne sufiĉos por kompletigi la mondoliberigon aŭ la elliberigon de la homoj aŭ la savon el ilia besta mentalito en ilia interno. Li vidis ankaŭ, ke la homaro post tiu ĝia travivado de la tago de la lasta juĝo eksentos sian inklinon al religio, kio siavice rezultigos la grandan demandon: Kion mi devas fari por beatiĝi? – Li komprenis ankaŭ, ke tiu demando ne estas respondebla per ia ajn informo pri materiaj aŭ fizikaj fenomenoj. Tiuj demandoj la homoj tiutempe havos responditaj ĝis trivialeco. Ne, kion bezonos la homoj, tio estas vera respondo de la vivmistero mem, respondo aŭ informo pri tiu inteligenta potenco, kiu aperas ĉie kiel scienca fakto malantaŭ ĉiuj formoj de la kre-procezoj de la naturo. Mankos al ili la respondo pri ĉiuj tiuj nevideblaj realaĵoj, kiuj konsistigas ilian propran internan memon aŭ mion, sed kiujn ili nek povas observi per mikroskopoj, nek per aliaj optikaj instrumentoj, ja, kio mankos al ili, tio estos informoj pri tiu tuta mondo, kies ekziston malantaŭ la fizika mondo ili komencos kompreni, sed kiu estas tute nealirebla per la ordinaraj fizikaj sensoj, kaj kiun ili sekve estos malhelpitaj esplori. Li vidis, ke la estonta procezo de la mondoliberigo devos baziĝi sur scienco, kiu kapabligos la homojn mem esplori kaj observi tiun mondon ankoraŭ misteran al ili, sed kies ekzisto jam estos al ili klara. Kaj li sciis, ke tiu scienco estos ĝuste tiu, el kiu li mem donis al la homoj la grandajn idealojn kaj aŭ rezultojn kaj ordonojn. Tio estis nenio malpli ol la tiel nomata “sankta spirito”. Same li sciis, ke la patro rivelos tiun sciencon al la homoj ĉirkaŭ la fino de la “tago de la lasta juĝo”, ĉirkaŭ la “lastaj tempoj” de la milita kulturo. Tio fariĝas fakto per liaj eldiroj pri “la Parakleto, la Sankta Spirito, kiun la Patro sendos en mia nomo, instruos vin pri ĉio, kaj vin rememorigos pri ĉio, kion mi diris al vi. Tamen kiam venos li, la Spirito de la vero, li gvidos vin en ĉian veron; ĉar li parolos ne de si mem; sed kion ajn li aŭdos, tion li parolos; kaj li anoncos al vi venontajn aferojn. Li gloros min, ĉar li ricevos el miaj kaj anoncos al vi. Ĉio ajn, kion la Patro havas, estas mia; tial mi diris, ke li ricevos el miaj kaj anoncos al vi.”

## 20. La mondoliberigo de la 20-a jarcento


Ĉar spirito estas la sama afero kiel pensoj kaj scio, “la Parakleto la sankta spirito” sekve ne estas viro, kiu venus al la homoj. Kontraŭe estas: pensoj kaj scio pri la tuta vero, do scienco. Kiam Kristo diras, ke “li ricevos el miaj kaj anoncos al vi”, tio do signifas, ke tio donota al la homoj estas la predikado de Jesuo en scienca formo. Kaj estas tiu scienco, kiu lin gloros. Kaj la kosmaj analizoj de tiu scienco estas la mondoliberigo de la 20-a jarcento. Tiu scienco pri la eterna ekzisto de la Dieco kaj la vivantaj estuloj, tiu scio pri la eterna spirito de Dio, kiu “ŝvebis super la akvo”, kies lumo brilas kaj radias en la baza tono de la universo kiel kulminanta amo – tiu estas la solvo de la vivmistero. La ekloĝo de tiu dia spirito en la kondutmaniero de la homoj estas tio, kio kreas “la regnon de la ĉielo” sur la tero, kiu siavice estas la sama afero kiel la plenumiĝo de la kristnask-evangeliaj paco kaj difavoro por la homoj. Ne estas strange, ke la memoro pri Jesuo el Nazareto ne povis forgesiĝi aŭ morti, tiel kiel okazis al ĉiuj aliaj krucumitoj. Per tia donaco da Dia lumo en la sferojn de la tero, kian la Dieco rivelis kaj plu rivelas tra li, ĉiu ajn homo iom post iom estos devigita ekkompreni, ke li vere estis “la vojo, la vero kaj la vivo”, kaj ke ĉiu, kiu lin sekvos, estos plenkonscia pri la Dieco kaj sia propra eterna vivo.

El libreto n-ro 14, La kreado de la konscio. Traduko Jens Stengaard Larsen

# Klarigo pri simbolo n-ro 17
# Reenkarniĝo, cikloj kaj sezonoj

**1.** La simbolo estu legata de maldekstre dekstren, kaj ĝi simbolas la cikloprincipon en ties diversaj aperoj kaj kun ĝiaj kvar subprincipoj, kiujn ni konas kiel la ”sezonojn” de la jaro aŭ jara ciklo. Supre plej maldekstre en la simbolo ni vidas nigran rondan figuron. Ĝi markas tiun lokon en la jara ciklo, kiun ni konas kiel ”vintran solsticon”. De tiu figuro deiras parte nigra kaj parte blanka linio malsupren tra nigra regiono, kie tiu estas plej larĝa. Tiu nigra regiono simbolas ”la principon de la vintro”, kaj la linio markas do la kulminon de tiu principo, tion, kion ni nomas ”vintromezo”. Supre iom dekstre ni havas alian rondan figuron, kiu estas duone nigra kaj duone blanka. Tiu figuro markas tiun lokon en la jara ciklo, kiun ni nomas ”printempa ekvinokso”. Ni vidas tie, ke la nigra regiono reduktiĝis kaj fariĝis malpli larĝa. Tio esprimas la reduktiĝon de la vintro aŭ vintra principo. Ni vidas ankaŭ, ke la blanka regiono, kiu esprimas ”la someran principon” de la jara ciklo, pligrandiĝis kaj kaŭzos la aperon de ”la printempo”. La printempo sekve estas meza fenomeno inter la kulmina principo de vintro kaj somero.

Sed ni vidas, ke la blanka regiono pligrandiĝas kaj fariĝas la reganta, dum la nigra regiono nun malpligrandiĝas al latenta stato. La ronda figuro supre super la kulmina blanka regiono esprimas ”la someran solsticon”, tiun lokon en la ciklo, de kie regas ”la somera principo” aŭ ”la somero”. De la somera solstico antaŭen al la sekva duona blanka kaj duona nigra ronda figuro, kiu esprimas tion, kion ni nomas ”aŭtuna ekvinokso”, ni havas do la regionon aŭ principon de la somero. De la ekvinoksa figuro antaŭen al la tute nigra ronda figuro, kiu esprimas ”la vintran solsticon”, ni havas la regionon de ”la aŭtuno”. Post tio ni denove venas al vintra solstico, kaj post tio al nova printempo, kaj tiel daŭrante. La aŭtuno estas do meza fenomeno inter la regionoj de la somera kaj vintra principo. Ni vidas, ke pli malsupre en la simbolo la regiono de tiuj jaraj sezonoj krome estas markita per la figuroj kun la oblikvaj strioj. La figuro kun la grizaj strioj esprimas la regionon de la vintro. - La figuro kun la verdaj strioj esprimas la regionon de la printempo. - La figuro kun la diverskoloraj strioj esprimas la regionon de la somero, kaj la figuro kun la ruĝaj strioj esprimas la regionon de la aŭtuno.



**2.** Tiuj kvar sezonprincipoj troviĝas ankaŭ en ”la tagnokta ciklo”, sed kompreneble en multe pli malgranda formato. En tiu ciklo ”noktomezo” estas la principo de vintro. ”La mateno” estas la printempo de la tagnokta ciklo, kaj la tagmezo estas ĝia somera regiono. ”La vespera regiono” de la tagnokta ciklo estas ĝia aŭtuna regiono. Kaj ankaŭ tie en la simbolo ni povas do legi la sezonojn de la tagnokta ciklo. Tio okazas per la samaj signoj kiel tiuj, per kiuj ni esprimis la jaran ciklon.

**3.** Sammaniere ni povas legi en la simbolo ankaŭ la sezonojn en la tervivaj cikloj de la vivaj estuloj. En tiu ciklo tio, kion ni nomas ”la infanaĝo”, estas la regiono de la vintra principo. En sia beba infanaĝo la viva estulo troviĝas en sia plej malgranda vivaktivado. Sed, same kiel la senfolia arbo en la arbaro dum la vintro, ĝi havas en si la vivĝermojn aŭ talentokernojn, kiuj aktiviĝas iom post iom. Tiun aktivadon en la terviva ciklo ni nomas ”la junaĝo”, kaj ĝi estas la samo kiel la aktivado de ”la printempa principo” en tiu ciklo. En tiu ”printempo” la vivaktivado kreskas same kiel en la

printempo de la jara ciklo. Post la junaĝo sekvas ”la maturaĝo”, kiu estas la samo kiel ”la somero” en la terviva ciklo. Post la maturaĝo sekvas ”la maljunaĝo”, kiu estas la samo kiel ”la aŭtuno” en tiu ciklo. En la simbolo tiuj sezonoj de la terviva ciklo estas markitaj per la samaj signoj kiel la sezonoj de la tagnokta kaj jara cikloj, aŭ kiel someroj kaj vintroj, printempoj kaj aŭtunoj.

**4.** Sed same kiel ni travivas la tagnoktan ciklon, la jaran ciklon kaj la tervivan ciklon, tiel ni travivas ankaŭ la samajn kvar sezonajn principojn en la granda kosma spiralciklo. Ni povas ja eĉ vidi, en kiu sezono la tera homaro troviĝas en tiu giganta ciklo. Ni scias, ke la spiralciklo ampleksas ses regnojn, do regnon por ĉiu el la ses bazaj energioj. En la simbolo ni vidas, ke tiuj regnoj estas markitaj per siaj kutimaj koloroj. La signoj de solsticoj kaj ekvinoksoj markas en la simbolo tiujn regnojn, kiuj formas la kvar sezonojn de la spiralciklo mem. Legante de maldekstre dekstren en la simbolo, ni vidas sub la signo de vintra solstico la vintran zonon de la spiralciklo. Ni vidas, ke la nigra regiono, kiu esprimas la mallumon, la suferojn aŭ malbonon, kaj per tio la principon de la vintro, kulminas en la besta regno, kiu supre kaj malsupre en la simbolo estas markita per la oranĝa koloro de tiu regno. Plej maldekstre en la simbolo ni vidas la plantan regnon, kiu supre kaj malsupre estas markita per la ruĝa koloro de tiu regno. Ni vidas tie laŭ la oblikvaj ruĝaj strioj, ke la planta regno kaj la unua duono de la besta regno konsistigas la kosman aŭtunan zonon de la spiralciklo. Kaj la lasta duono de la besta regno kaj la vera homregno (markita per la flava koloro) konsistigas la vintran zonon de la spiralciklo kaj krome estas markita per la oblikvaj grizaj strioj. Post tio ni vidas, ke la tuta saĝoregno, kiu supre kaj malsupre estas markita per la verda koloro, kaj la unua duono de la dia mondo, kiu supre kaj malsupre estas markita per la blua koloro, konsistigas la kosman printempon de la spiralciklo. Ĝi estas markita per la oblikvaj verdaj strioj. Post tiu printempo venas la kosma somero de la spiralciklo. Ĝi etendiĝas tra la lasta duono de la dia mondo kaj tra la tuta beatoregno. Ĝi estas markita per la diverskoloraj oblikvaj strioj, kaj la beatoregno estas markita supre kaj malsupre per la hele indiga koloro. Kaj post tio ni denove renkontas plantan regnon, kiu kune kun la unua duono de nova bestoregno formas novan aŭtunon (markitan per la ruĝaj strioj), kaj tiel la alternantaj kosmaj sezonoj daŭras en la ĉiopenetra eterno de la spiralcikloj.

**5.** La kaŭzo, ke la besta regno de la spiralo estas esprimebla kiel ĝia vintra zono, kompreneble estas, ke ĉi tie hejmas la morto aŭ la mortiga principo. La vintro estas ja la regiono de mallumo, malvarmo kaj morto, kie la vivo sekve povas ekzisti nur en sia plej malgranda aŭ latenta stato de aktivado. Tial tiu regiono estas hejmloko de la kosma senkonscio. La nefinaj homoj, kiuj estas la plej noblaj estuloj de tiu regiono, havas nur tre malgrandan subsentan aŭ instinktan imagon pri tiu realo, kiu ekzistas ekster la iluzia realo, en kiu ili vivas. Ili ne konas sian senmortecon aŭ eternan vivon. Ili ne konas la ekziston de Dio aŭ la sencon de la vivo. Ili estas la senfoliaj arbaroj aŭ la dormantaj vivoformoj de la kosma vintra zono. Sed la kosma vintro ne estas nur vivreduktiĝo, morto, dormo kaj malvarmo. Ĝi havas ankaŭ siajn grandajn ĝojojn. Dio kaj la lumo ĉeestas ankaŭ en la mallumo. La perfekta homregno apartenas al la vintra zono de la kosma spiralciklo, ĉar ankoraŭ en supera grado la estuloj dependas de reenkarniĝo aŭ renaskiĝo en fizikan materion, kaj ĉar nur en la lastaj stadioj de tiu regno ili plene liberiĝas de tiu fizika vivkondiĉo de la malpli altaj sferoj. Tiel grandioze die lumanta kaj varmiga en praktikaj saĝo kaj amo estas la plej alta dia vivoformo, alivorte la vivo en la plej altaj mondoj, ke rilate al ĝi eĉ la grandaj bonfarto kaj dieco de la perfekta homregno estu konsiderata kiel apartena al la regiono de la vintro, kaj eĉ ne al la printempa regiono de la spiralciklo. Tio, kio levas la vintran principon en la lumajn bonojn de la perfekta homregno, estas la intelektigita sento aŭ vera proksimula amo. Tio estas markita en la simbolo per la du horizontalaj, konusformaj figuroj en flava kaj verda koloroj, kiuj esprimas senton kaj respektive inteligenton. Tiu intelektigita sento aŭ absoluta proksimula amo estas la baza tono de la universo. Ĝi komencas do evolui en la besta regno kaj transformiĝas al la stadio de la fina

homo. Estas tiaj finaj homoj, kiuj levas la kosman vintran zonon super la principon de la morto kaj suferoj tiel, ke la amo povas lumi kaj varmigi ankaŭ en la kosma vintra zono en la fizika sfero. Sed ni vidas ankaŭ, ke la tera homaro ankoraŭ ne progresis al tia perfekteco. Ankoraŭ ĝi vivas en mense krudaj mortigaj frosto kaj malvarmo, kio signifas: en sfero de malamo, venĝo, milito kaj suferoj, funebro kaj deprimo, vivabomeno kaj sinmortigo (Luk 2.14). La tera homaro ne atingis tute elveni el tiu mortiga vintra stato, ne atingis mildigi ĝin sur la tero per la paco de la fina homregno aŭ la kristnaska evangelio, ne atingis mildigi ĝin per la rezultanta granda agrablego por la homoj. Ĝi troviĝas do en la vintromeza zono de la kosma spiralciklo, en kiu ĝi ĝuste transformiĝas al la komplete fina aŭ perfekta homaro, kiu eĉ en la sfero de la mallumo povas travivi la brilabundon de Dio kaj fari tiun sferon luma tiel, kiel estas la fina homregno meze en la vintra zono de la kosma spiralciklo.

**6.** Kun tiu brila perfekteco de la vivtravivado la fina homo povas nun levi sin el la pli aŭ malpli masiva stato de manifestado de la reenkarniĝo kaj de la peza fizika materio, kaj povas eniri en la kosman printempon de la spiralciklo (markita per la verdaj oblikvaj strioj). Ni vidas, ke kiel antaŭe menciite, tiu printempa regiono etendiĝas en la spiralciklon tra la saĝoregno kaj la unua duono de la dia mondo. Tiu regiono esprimiĝas kiel la printempo de la spiralciklo, ĉar ĝi estas interstadio inter la kosmaj lumo kaj mallumo sammaniere, kiel la fizika printempo estas interstadio inter la fizikaj vintro kaj somero aŭ ŝanĝiĝantaj fizikaj malvarmo- kaj varmoepokoj. Tiu regiono estas esprimita kiel ”la saĝoregno”, ĉar tie kulminas ĉia saĝo, ĉia intelekteco kaj scienco. Tie materiiĝas en pensmaterio ĉiuj ideoj kaj planoj, kiuj poste estos manifestataj en la fizikaj naturo kaj materio sur fizikaj planedoj kaj mondoj. Tie en la saĝoregno ĉiuj sciencistoj, esploristoj, verkistoj kaj artistoj ricevas sian paradizon dum sia pasado en la terviva ciklo. Tie troviĝas tiuj ”multe da loĝejoj”, pri kiuj parolas Kristo en la evangelio de Johano (Joh. 14.2). Tiuj ”loĝejoj” estas la samo kiel la multaj diversaj specoj de ”paradizoj”, kiuj ankaŭ estas la samo kiel la diversaj specoj de centprocentaj agrablosferoj, en kiuj la elkarniĝintaj aŭ spiritaj estuloj ĝuas sian plej altan senton de agrablo aŭ feliĉo. La kaŭzo, ke ekzistas multaj diversaj agrablosferoj aŭ paradizoj, estas ekskluzive, ke per tio ĉiu estulo en la spirita sfero havas eblon ricevi precize tiun staton de vivtravivado, kiun pro siaj provizoraj evoluŝtupo kaj perceptotalento ĝi sentas kiel sian plej altan staton de feliĉo. Troviĝas do paradizo por ĉiu ajn sensaro. Estas egale, ĉu la estulo estas pagano aŭ kristano, ĉu ĝi estas materiisto aŭ sendia, aŭ ĉu ĝi estas forte religiema. En sia spirita epoko, post sia fizika morto kaj ĝis sia renaskiĝo en la fizikan sferon, ĝi ĝuos la paradizon, kaj tio signifas: tiun plej altan staton de feliĉo alireblan por ĝia individua sensaro, aŭ plej altan dian bonfarton kaj ĝojon pro la ekzisto. La spiritaj mondoj sekve estas hejmloko nur por lumo kaj daŭre lumo. Nur en la fizika vivsfero la vivaj estuloj ricevas la karmon aŭ sorton de siaj suferoj. Sed la transiro de la fizika al la spirita sfero, alivorte tiu proceso, kiun ni nomas ”purgatorio”, povas esti pli aŭ malpli malluma aŭ malagrabla, tute laŭ la mensa malharmonio kun la specialaj moralaj leĝoj de la evoluŝtupo, sur kiu oni eventuale troviĝas, kiam okazas la fizika morto.


**7.** Post tiu kosma printempa regiono sekvas la somera epoko de la spiralciklo, kiu, kiel antaŭe menciite, estas markita en la simbolo per la oblikvaj diverskoloraj strioj. Kiel montrite en la simbolo, tiu epoko etendiĝas tra la lasta duono de la dia mondo kaj tra la tuta beatoregno. Tie la estuloj vivas en la plej alta idea mondo. Ĉiuj ekzistantaj ideoj aŭ vivrezultoj troviĝas tie. La estuloj povas tie percepti la vivrezultojn de la tuta universo, de fremdaj loĝataj mondoj, planedoj, sunoj kaj galaksioj kun iliaj strukturoj kaj ravaĵoj. Ja tie la tuta brilabundo de la vizaĝo de Dio brilas, lumas kaj varmigas senbare alirebla por la eternaj difiloj en tiu plej alta, ekstera lumoceano aŭ altkosma sfero de la vivo en kunvivado kun Dio. Tie aperas la ideoj por la makrokosmaj kiel por la mikrokosmaj vivsferoj kaj strukturoj. De tie pere de la formado en la pensmaterio de la saĝoregno ĉiuj ideoj pluiras al la fizikaj mondoj en makrokosmo, mikrokosmo kaj ankaŭ mezkosmo. De tie la

kosma konscio aŭ plej alta scio povas per la intuicio transiĝi al la evoluinta homo en la fizika sfero, kaj povas doni al ĝi kosmajn ekbrilojn kaj en plej favora kazo konstantan ”kosman konscion”. Sed samtempe kun tio, ke la estuloj perceptas la vivrezultojn, ili komencas ankaŭ tie travivi la beatoregnon, kaj tio signifas: travivi la memorojn de siaj vivoj en la fizika mondo. Tie tiuj memortravivaĵoj estas videblaj nur en speciale luma brilaĵo, kaj sekve ili realigas beaton. Tial en mia ĉefverko ”Livets Bog” (La Libro de la Vivo) mi nomis tiujn memorojn ”orkopioj”. Tie la vivo de la estulo pli kaj pli fariĝas memortravivado. Tial la estulo fine ĉesas travivi en la ekstera mondo, kaj tio signifas, ke ĝi travivas nur siajn memorojn aŭ orkopiojn kaj finfine troviĝas en totala beato. Ĝi sekve ne plu havas konscian kontakton kun la eksteraj mondoj: la dia mondo kaj la saĝoregno. Tie la finaj homoj laŭ la bildo de Dio povas travivi siajn memorojn de la farita pasado tra la tuta spiralciklo, ekde la unuaj subsentostatoj en la plantoregno ĝis sia alta kosma vivo en la saĝoregno kaj la dia mondo. Nun laŭplaĉe ĉiuj tiuj rememoroj estas travivataj kiel maldorma tagokonscio. Tiu tuta granda memoroceano de la travivado de tuta ciklopasado fare de la estulo estas ja en sia tutaĵo kopio de la universo tiel, kiel la menciita estulo travivis ĝin per siaj fizikaj kaj kosmaj sensoj. Ĉar en la beatoregno ĝi ne povas travivi en la ekstera mondo, sed povas travivi nur siajn memorojn, ĝi sekve ne plu havas ian ajn konscian kontakton kun ia ajn viva estulo kaj ankaŭ ne kun iaj ajn objektoj en la eksteraj mondoj.

Ĝi troviĝas absolute sola en sia propra universo konsistanta el la propraj memoroj. En tiu universo ĝi mem estas la absolute sola ekzistanta origino. Ĝi troviĝas kiel Dio en tiu universo. Pere de siaj sensoj ĝi mem kreis tiun universon. Laŭ sia plaĉo la estulo povas en tiu universo retravivi sian vivon en la plantoregno, sian vivon en la bestoregno, sian vivon en la homregno kaj sian vivon en la plej altaj mondoj. En tiu universo ĝi povas iri tien kaj reen en tempo kaj spaco kaj per sia memorkorpo retravivi la detalojn de sia vivo tra la tuta spiralo. Tiu memorkorpo kulminas tie en sia plej alta aktivado, sed por la teraj homoj tiu korpo estas preskaŭ latenta en ilia nuntempa stadio. (Vidu simbolon n-ro 12). En la beatoregno la estuloj ne estas konsciaj pri la eksteraj mondoj, kaj tio kaŭzas estiĝon de la tiel nomata ”senviva” materio. Tiun materion ni konas ankaŭ kiel ”mineralan materion”. La kaŭzo, ke tiu materio estas konsiderata kiel senviva, estas nur tio, ke sen ia ajn tagokonscia interveno fare de la fizika sfero ĝi estas rekte gvidata kaj direktata de la spirita sfero. Ĝi estas gvidata ekskluzive aŭtomate. La minerala materio mem estas energielfluoj de la beatoregno. Estas pensimpulsoj de la grandiozaj ekstazenergioj de la beatoregno, kiuj enkarniĝas tie aŭ kombiniĝas kun la materioj de la fizika mondo, kaj per tio komencas enkarniĝo de spirito en ĝin. Laŭ tio, ke tiu materio evoluas kaj fariĝas pli kaj pli uzebla por la mioj ekzistantaj malantaŭ la menciita spirito, ili iom post iom forlasas la beatoregnon kaj komencas krei videblajn manifestaĵojn en la fizika materio. Interalie kristaliĝo, formiĝo de glacifloroj kaj aliaj figuroj de kristaliĝo, estas en sia plej interna naturo aŭtomataj impulsoj de la beatoregno. Ili realigas la unuan delikatan komencon de kreado de venontaj fizikaj organismoj por la elkarniĝintaj mioj en la beatoregno.

**8.** Tiel spertinte en la somera epoko de la spiralciklo la plej altan dian formon de vivtravivado de la universo, la mioj de la beatestuloj daŭre pluiras en sia enkarniĝo en la fizikan materion. Per tio tiu materio ŝanĝiĝas al vegetalaj organismoj, kiuj plue evoluas al pli granda perfekteco kaj fariĝas animalaj organismoj, pere de kiuj la mioj povas aperi kiel tiuj estuloj, kiujn ni nomas ”bestoj”. En la plantoorganismoj la beatomioj povas ”subsenti” la fizikan mondon. Ili povas do ”subsenti” agrablon kaj malagrablon, ili povas ”subsenti” varmon kaj malvarmon. Ĉar ili tiel povas ”subsenti” en la fizika sfero, la vegetala materio estas konsiderata kiel ”viva”. Per la minerala organismo ili do ne povas travivi ion ajn en la fizika sfero. Tio estas la kaŭzo, ke tiu materio estas konsiderata kiel ”morta” aŭ senviva. Sed la evoluo de la vegetala organismo al animala organismo kaŭzis, ke per tiu evoluo la estulo ricevis fizikan sensaron. Ĝi povas per ĝi maldorme tagokonscie travivi la fizikan mondon. Sekve la plantaj estuloj konsistigas vivsferon, kie la vivtravivado estas nur subsento. Sed

la kapablo ”subsenti” estas tamen perceptado kaj sekve estas esprimo de konscio. Tiun vivsferon de la estuloj ni konas kiel la ”plantoregnon”. Ĉar la bestoj estas estuloj aŭ mioj, kiuj evoluis ne nur por povi subsenti, sed kiuj havas tutan sensaron, per kiu ili povas percepti la fizikan mondon ĉirkaŭ si kiel fakton, do ili konsistigas ankaŭ sferon de konscio aŭ vivtravivado, nome tiun, kiun ni konas kiel ”la bestoregnon”. En la simbolo ni vidas, ke la planta regno kaj la unua duono de la besta regno estas la aŭtuna epoko de la spiralciklo (markita per la oblikvaj ruĝaj strioj). Tiuj regnoj estas esprimitaj kiel la aŭtuno de la ciklo, ĉar en la ciklo ili konsistigas la interzonon inter la malkreskanta somera epoko kaj la kreskanta vintra epoko. Kaj de tie la stato de vivtravivado de la estuloj daŭras en la vintran epokon de nova ciklo, kaj tiel daŭrante tute eterne, tamen tiel, ke ĉiu nova ciklo aperas en nova kaj pli alta vario.




**9.** Tra la figuroj de la jarsezonoj, kiuj estas markitaj per la oblikvaj strioj, iras du nigraj strekoj. Ili dividas la figurojn en tri partojn. La supra parto simbolas makrokosmon. La meza parto simbolas sammaniere mezkosmon, kaj la malsupra parto mikrokosmon. Tio simbolas, ke la kvar sezonprincipoj troviĝas en ĉiuj ekzistantaj makrokosmoj, mezkosmoj kaj mikrokosmoj.

**10.** La plej malsupra kolora figuro, kiu etendiĝas tute de maldekstre ĝis dekstre en la simbolo, markas nur la kulminon de mallumo kaj la kulminon de lumo. Tie, kie tiu figuro estas plej mallarĝa, ni havas la kulminon de la epoko de mallumo aŭ vintro. Kaj tie, kie tiu figuro estas plej larĝa, troviĝas la kulmino de la somera epoko. Kiel antaŭe tuŝite, tio montriĝas ankaŭ respektive per la nigraj sekcioj, kiuj estas plej larĝaj ĉe la sekcioj de la vintra solstico, kaj per la blanka sekcio, kiu estas plej larĝa ĉe la sekcio de la somera solstico. Tie, kie la plej malsupra kolora figuro estas plej larĝa, ekzistas, kiel ni poste vidos, la unuaranga konscio de la vivo aŭ Dio, same kiel la duaranga konscio de la vivo aŭ Dio ekzistas tie, kie la figuro estas plej mallarĝa. Laŭ la koloroj ni vidas la regnojn, kiuj konsistigas la kapaciton de la duaranga konscio, kaj la regnojn, kiuj konsistigas la kapaciton de la unuaranga konscio. Tiuj du konscikapacitoj restas neskueblaj. Ili konserviĝas per la pasado de la vivaj estuloj tra ili. La duaranga konscio de Dio estas portata de la estuloj en la plantoregno kaj de la estuloj en la bestoregno, al kiuj lastaj apartenas la nefina tera homo. Post tio sekvas la unuaranga konscio de Dio. Ĝi estas portata de la estuloj en la komplete perfekta homregno, de la estuloj en la saĝoregno, de la estuloj en la dia mondo kaj de la estuloj en la beatoregno. Tiuj lastaj konsistigas la memoron de Dio. Tiuj regnoj de la spiralciklo sekve estas eternaj konscistadioj en la konscio de Dio. Ili konserviĝas do per la eterna pasado de la estuloj tra la spiralcikloj. Per tiu pasado la eterna kapablo de vivtravivado estas novigata aŭ konservata kĴj por Dio kĴj por la vivaj estuloj unuope. La pasado tra la cikloj estas daŭrigata per ”la principo de malsato kaj satiĝo”. Eterne la estuloj avidas kaj sopiras pri la malo de tio, per kio ili estas satigitaj. Neniu ajn estulo povas daŭre ĝui la saman objekton sen satiĝi je ĝi. La satiĝo rezultigas malsaton

aŭ intereson pri nova objekto, kaj tiel daŭrante. Kaj sur tiu principo estas bazita la tuta spiralpasado, kaj per tio ankaŭ ĉia vivtravivado. Tiel la vivtravivado de la vivaj estuloj estas pasado tra la eternaj kosmaj spiralcikloj. Tiu pasado estas epoko de alternantaj malsato kaj satiĝo. La tera homaro sekve troviĝas nuntempe en sia komenciĝanta epoko de malsato pri la lumo. Ĝi pli kaj pli satiĝas de la mallumo: milito, malsanoj kaj suferoj. Ĝi komencas malsatiĝi pri proksimula amo, ĝi malsatas pri vera daŭra paco sur la tero. Ĝi malsatas pri pli alta formo de vivo ol la besta kaj mortiga, sub kiu ĝi nun tiel altgrade ĝemas kaj anhelas. Kaj tiu kreskanta satiĝo de la mallumo kondukas la homojn iom post iom en la luman epokon de la spiralciklo, en ĝian someran epokon, en la plej altajn mondojn, en la unuarangan konscion de Dio. Tie ili estos do tiuj plej altaj estuloj de paco, de saĝo, de amo kaj de kreado, kiuj estas la iloj de Dio por manifestado de lia unuaranga konscio. Sed en neskuebla pura formo vivi en tiuj plej altaj brila lumo, agrablo kaj bonfarto de la vivo, kaj fari tion dum nememoreblaj tempoj, tio neeviteble kreas satiĝon. Satiĝo kreas ankaŭ sopiron pri la malo. Kaj la malo de lumo estas mallumo. Pro tiuj kreskantaj satiĝo de lumo kaj malsato pri mallumo, la estuloj en la plej altaj mondoj estos samgrade kondukataj el la plej altaj mondoj kaj en la mondon de mallumo en la fizika sfero. Tie ili denove satiĝos de mallumo kaj komencos malsati pri lumo, kaj de tiu malsato ili estos denove kondukataj en la mondojn de la lumo, kaj tiel daŭrante tute eterne. Sen tiu ŝanĝiĝanta stato ne povus ekzisti ia ajn eterna vivtravivado, kaj sekve ankaŭ nenia ajn eterna vivo, nek por Dio nek por la viva estulo. Kaj de tia satiĝo de lumo en la plej altaj mondoj, kaj pro la rezultinta malsato pri mallumo aŭ la kontrasto al lumo, ĉia ekzistanta vivo sur la tero estos enkarniĝinta en ĝian fizikan regionon por tie satiĝi de mallumo, kaj denove eksopiri pri lumo kaj per tio reveni al ĝi, kaj tiel daŭrante.

**11.** Ĉi tie ni ekvidis la principon malantaŭ la eternaj vortoj de la Biblio, kie Dio diras: ”Tiel longe, kiel la tero ekzistos, semado kaj rikoltado, malvarmo kaj varmo, somero kaj vintro, tago kaj nokto ne ĉesiĝos” (Gen. 8.22). Ke tiuj fenomenoj ne povos daŭri sur la tero, kiam ĝi pereos, tio estas evidenta. Sed ni nun vidis, ke tiuj vortoj kovras eternan kosman principon, kiun ni ekkonis kiel la kontrastprincipon. Kaj ĉi tie en simbolo n-ro 17 ni vidis tiun principon formi la bazon aŭ fundamenton de ĉia manifestado, kaj ke ĝi ne nur manifestas sin en la pure fizika formo de tago kaj nokto, somero kaj vintro, sed ke ĝi manifestas sin ankaŭ en pli kaj pli grandaj formatoj, kaj kreas gigantajn kosmajn epokojn de lumo kaj mallumo (la spiralciklojn) kun la samaj kvar sezonprincipoj, kiujn ni konas en la fizika jarciklo. Ankaŭ en ĉi tiuj gigantaj vivepokoj ni vidas tempojn de solstico kaj ekvinokso, kosmajn epokojn de vintro kaj somero, kiuj senĉese daŭras supren en la senfina grando kaj malsupren en la senfina malgrando. Se tiuj epokoj ne ekzistus, nenia ajn formo de vivo povus ekzisti.

**12.** Kaj ankaŭ ĉi tie en nia analizo de la cikloprincipo ni vidis la neceson kaj ekziston de reenkarniĝo. Per tio ni ekkonis la neskueblan veron en la vortoj de Jesuo al Nikodemo: ”Vere, vere mi diras al vi: Se homo ne estas denove naskita, li ne povas vidi la regnon de Dio”. (Joh. 3.3) - Nikodemo demandas al li: ”Kiel povas homo naskiĝi, kiam li estas maljuna? Ĉu li povas eniri denove en la ventron de sia patrino kaj naskiĝi?” (Joh. 3.4) - Jesuo respondis: ”Vere, vere, mi diras al vi: Se homo ne estas naskita el akvo kaj la spirito, li ne povas eniri en la regnon de Dio (Joh. 3.5). Tio, kio naskiĝas el la karno, estas karno, kaj tio, kio naskiĝas de la spirito, estas spirito (Joh. 3.6). - Ne miru, ke mi diris al vi: Vi devas esti denove naskitaj (Joh. 3.7). - La vento blovas, kien ĝi volas, kaj ĝian voĉon vi aŭdas, sed vi ne scias, de kie ĝi venas kaj kien ĝi iras, tia estas ĉiu, kiu estas naskita de la spirito” (Joh. 3.8). - Estas same malfacile por la ordinara nefina materiisma tera homo kompreni tiun, kiu estas naskita de la spirito, same kiel en la tempo de Jesuo estis malfacile kompreni, de kie blovas la vento, de kie ĝi venas, kaj kien ĝi iras. Sed same kiel en nia tempo oni progresis por povi konstati, de kie venas la vento, kaj kien ĝi iras, tiel en nia tempo oni komencas kompreni ankaŭ tion, kio estas naskita de la spirito, alivorte tion, kio estas la dia plej alta saĝo, la

solvo de la vivmistero, kaj per tio ankaŭ estas scio pri la renaskiĝo en intelektigita formo kaj sekve alirebla por la inteligento. Kaj ĉi tie la analizoj igas nin pensi ankaŭ pri la plej profunda senco de tiuj vortoj, kiujn laŭ moro kaj kutimo oni diras en la kristana entombiga ceremonio: ”El la tero vi venis - en la teron vi venos, kaj el la tero vi revenos” (Gen. 3.19). Ĉu ne tiuj vortoj atestas ĝuste pri la renaskiĝo? Ĉu ne la fizika organismo de la viva estulo ĝuste ”venis el la tero”, kio signifas, ke ĝi estas konstruita el materio. Ĉu tiu kreita organismo devas denove dissolviĝi kaj fariĝi tero? - Ĉu ne estas ĝuste tio, kio okazas per la tiel nomata ”morto”? - Sed kiu konstruis tiun organismon? - Kaj ĉu tiu organismo ekzistas nur pro si mem? - Ĉu la nura materio aŭ tero povas komenci krei organismon? - Ne, per niaj kosmaj analizoj ni jam scias, ke tio estas tute malebla, kaj ke necesas kĴj spirito kĴj iu mio por povi krei organismon, kaj entute por povi krei. Kaj de la samaj analizoj ni scias ankaŭ, ke la mio en la viva estulo estas eterna. Neniam ajn ĝi venis el tero, kaj neniam ajn ĝi povos fariĝi tero. Ĝi estas la eterna kreanto. Ĝi povas krei kaj konstrui el ”tero”, kio ja ĉi tie signifas materion. Tiu mio povas do el ”tero” konstrui al si fizikan organismon kaj fari ĝin sia korpo, kaj tiel dum kelka tempo, tiel longe kiel tiu pereema aŭ temp- kaj spacdimensia korpo povas ekzisti, ĝi povas fari sin unu kun tiu organismo kaj la fizika vivsfero. Tiamaniere ĝi povas fari sin unu kun ”tero” aŭ materio. Ĉiuj tiuj estuloj, kiujn ni renkontas en la fizika vivsfero, estas vestitaj per organismo konstruita el ”tero” kaj povas helpe de ĝi konservi sian fizikan vivon per kreado el ”tero”. Tiu ilia fizika vivo venas do el kreado el tero, kaj sekve neniel povas veni el io ajn alia. Sed la organismo de la mio devas ne nur ”veni el tero”, ĝi devas ankaŭ ”fariĝi tero”. La organismo ne povas ricevi eternan vivon. Ĝi estas kreita objekto, ĝi estas ilo, kiu estas uzata. Tial ĝi eluziĝas kaj nepre pereos. Ĝi dissolviĝos kaj denove fariĝos tero. Sed la mio, do la kreanto de tiu organismo, ja ekzistis antaŭ ol la menciita organismo kreiĝis, kaj pro sia nepereemo ekzistos ankaŭ post ĝia tiel nomata ”morto” kaj dissolviĝo. Ĝi estas do releviĝinta aŭ liberigita el ”tero”, el la fizika materio. Tiu mio aŭ kreanto sekve absolute ne povas ”fariĝi tero”, sed daŭre estas viva kaj ekzistas nun en sfero konsistanta el pensmaterio, alivorte en spirita aŭ psika vivsfero. Sed ĝuste ĉar tiu kreanto estas viva, ĝi povas, kiam kondiĉoj ekzistas por tio, denove konstrui novan fizikan organismon, denove krei kaj travivi en fizika materio kaj tiel fari sin unu kun ĝi, ”denove fariĝi tero”, kaj de tio denove releviĝi al spirita vivo, kaj tiel daŭrante. Ni renkontas do en la kristana entombiga ceremonio kosmajn vortojn, kiuj konfirmas la kosman analizon de la mondliberiganto: ”Se homo ne estas naskita el akvo kaj la spirito, li ne povas eniri en la regnon de Dio”.

**13.** Per ĉi tio ni trapasis la principon de la spiralcikloj kaj vidis, ke ili formas fundamenton por nia tuta travivado de la vivo, kaj ke per tiu principo estas garantiita al ni eterna neskuebla ekzisto, eterna konscinovigo aŭ daŭrigado de nia kapablo de vivtravivado. Ni vidis, ke sekve absolute ne troviĝas iu ”eterna perdiĝo” por ia ajn viva estulo, sed ke absolute ĉiuj vivaj estuloj ĝuas luman epokon de agrablo aŭ paradizon en la spirita sfero, en kiu ili troviĝas inter la fizikaj enkarniĝoj aŭ teraj vivoj. Ni informiĝis ankaŭ pri tio, ke la tera homaro troviĝas en la vintra epoko de la kosma spiralciklo, kaj iras al la printempa epoko de la sama ciklo. Same ni vidis, ke ĝi troviĝas en tiu zono de militoj kaj suferoj por iniciĝi pri la mistero de la mallumo, iniciĝi pri la efikoj de la malluma konduto, iniciĝi pri la vera kaŭzo de ĉia malfeliĉa sortoformado. Ni vidis, ke la spiralcikloj konsistigas brilan vojon de la vivo trans la ĉielon de la eterno prilumatan kaj portatan de la ĉiopenetraj amo, ĉioscio kaj ĉiopovo de Dio.

Traduko Ib Schleicher el dana originalo, Det Evige Verdensbillede 2, symbol nr. 17, Reinkarnation, kredsløb og årstider

## Esperanto – la internacia mondlingvo - parto 1 el 3

de Ole Therkelsen

### 1. En la nova monda kulturo la monda ŝtato havos sian propran specialan internacian lingvon

La evoluo sekvas tute difinitajn naturajn leĝojn, kaj per kono de ĉi tiuj leĝoj eblos antaŭdiri la evoluon de nova tutmonda kulturo. La multaj diversaj landoj de la tero unuiĝos, ne nur en la unuiĝintajn ŝtatojn de la mondo, sed en unu tutmondan ŝtaton, kiu certigos egalecan kaj justan dividon de la resursoj de la terglobo, kaj al Martinus estis memkompreneblaĵo ke tiu monda ŝtato ankaŭ havos sian propran specialan mondlingvon.

En la klarigo de simbolo n-ro 26, La vera homa regno, en kiu Martinus analizas la cirkonstancojn ĉirkaŭ la kreo de la internacia mondregno, li ankaŭ tuŝas la solvon de la monda lingvoproblemo per la kreo de internacia mondlingvo.

Martinus: "Estas nature kaj klare, ke en la monda ŝtato aŭ internacia mondregno oni ne lame iros per naciaj lingvaj lambastonoj, per interpretistoj kaj pli-malpli malbonaj tradukoj. La monda ŝtato kompreneble havos sian propran specialan internacian lingvon. Ĉiu unuopa infano en la lernejoj en la tuta mondo ricevos edukon en tiu internacia lingvo de la monda ŝtato. Imagu kia faciliĝo estos por la homoj de tiu tempo tute ne havi lingvajn barojn, senkonsidere kie ajn ili troviĝos sur la tero. Ĉiuj homoj en la mondo, de la sudo kaj la nordo, de la oriento kaj la okcidento, povos interparoli, povos interkompreniĝi. Per komuna lingvo la tuta mondo estos komuna patrio por ĉiuj homoj sendepende de nacieco, kulturo kaj raso. Imagu kia faciliĝo aŭ laborŝparo estos, kiam ne necesos traduki iajn ajn librojn aŭ skribaĵojn. Ĉiuj povos legi ĉion. Ke neniu el la ekzistantaj naciaj lingvoj estos uzata kiel tiu komuna lingvo, tio kompreneble estas tute certa. Neniu ajn el tiuj naciaj lingvoj estus uzebla sen eventuala estiĝo de ĵaluzo aŭ amaro, eble eĉ ankaŭ milito. Tial la mondo havos neŭtralan internacian lingvon. Kiam oni komencos instrui ĝin en ĉiuj lernejoj de la mondo, la infanoj, kiuj lernos ĝin, atingos la kapablon interparoli sendepende de nacieco kaj raso. Tio kontribuos al multe pli granda unuiĝo de la homoj en amikeco kaj paco, kaj daŭre pli altgrade faros ilin interligita frata popolo en la tuta mondo." (LEM2 par. 26.25).

### 2. La lingvokonfuzo de Babelo

En la Biblio oni povas legi pri la lingvokonfuzo kiu ekestis en la urbo Babelo, kiam Dio punis la homojn pro ilia malhumileco:

"Kaj ili diris: 'Venu, ni konstruu al ni urbon, kaj turon, kies supro atingos la ĉielon, kaj ni akiru al ni gloron, antaŭ ol ni disiĝos sur la supraĵo de la tuta tero.' – Kaj la Eternulo malleviĝis, por vidi la urbon kaj la turon, kiujn konstruis la homidoj. Kaj la Eternulo diris: Jen estas unu popolo, kaj unu lingvon ili ĉiuj havas; kaj jen, kion ili komencis fari, kaj ili ne estos malhelpataj en ĉio, kion ili decidis fari. Ni malleviĝu do, kaj Ni konfuzu tie ilian lingvon, por ke unu ne komprenu la parolon de alia.' Kaj la Eternulo disigis ilin de tie sur la supraĵon de la tuta tero, kaj ili ĉesis konstrui la urbon. Tial oni donis al ĝi la nomon Babel, ĉar tie la Eternulo konfuzis la lingvon de la tuta tero kaj de tie la Eternulo disigis ilin sur la supraĵon de la tuta tero." (Genezo 11.4-11.9).

Reale la lingvoj ja ne estis subite ŝanĝitaj, kiel en la simbola rakonto de la Biblio, sed dum la homoj disvastiĝis sur la tutan terglobon kaj vivadis en grupoj izolitaj inter si, ili ja tute nature ekhavis siajn proprajn spertojn, siajn proprajn ideojn, siajn proprajn esprimmanierojn kaj tiamaniere ankaŭ siajn proprajn lingvojn. Tiamaniere ekestis multaj izolitaj lingvoj, kiuj fortigis la gregan mentalecon kaj la nacian senton. Sed hodiaŭ estas granda ĝeno ne povi kompreni fremdajn lingvojn, kaj la homoj klopodas por solvi la problemon lernante tiujn el la grandaj naciaj lingvoj, kiuj plej multe disvastiĝis; sed tio ne sufiĉas por solvi la problemon.

Ankoraŭ plu nuntempe "Babelo" aŭ "la Babela turo" staras kiel simbolo de la granda lingvokonfuzo, kiu daŭre regas je internacia nivelo ĉi tie sur la tero.



### 3. Finevoluinta kaj perfekta komunikado

La litera alfabeto enhavas 28 literojn, dum la cifera alfabeto enhavas nur 10 nombroliterojn. (LB3 par. 1017-1023). Martinus skribas en sia ĉefverko Livets Bog ke same kiel la homo evoluigis ĝis perfekteco la nombrosistemon aŭ la ciferan lingvon, tiel ankaŭ la litera lingvo grade evoluos atingonte similan perfektecon. (LB3 par. 1047-1051).

Pensojn kaj ideojn oni povas komuniki al aliaj per skribo kaj parolo aŭ en arta formo per pentro aŭ skulpto. Al la homo estos ĉiam pli granda bezono esprimi sian vivon kaj plej internan esencon, kiu fine kulminos en la formo de disvolvo de viv-arto kaj pura amo al la proksimulo.

La nombra kaj litera lingvoj estas du el la plej malnovaj eroj en tiu disvolvo de viv-arto, kaj Martinus opinias ke la homo iĝos kapabla uzi la literan lingvon en maniero same perfekta kiel ĝi nun uzas la ciferan alfabeton. Tion oni neniam ajn sukcesos per la ekzistantaj naciaj lingvoj, kiuj ĉiuj estas plenaj de malregulaĵoj kaj aliaj nelogikaj fenomenoj, kiujn oni ne povas per la matematika logiko libere kaj kree kombini al novaj sencoportaj elementoj. La lingvo perfekta devas esti planlingvo, dekomence tiel konstruita ke ĝi estas tute liberigita pri malregulaĵoj kaj maladekvataj kutimoj kaj tradicioj. Ĝi devas enhavi aron da lingvaj elementoj kun prefiksoj kaj sufiksoj, kombineblaj tiamaniere ke oni povas esprimi precize tion kion oni deziras.

Esperanto estas tia lingvo, kiu pro sia perfekte logika kaj matematika strukturo plenumas tiujn postulojn kiujn oni povus fari pri la perfekta lingvo.

### 4. Esperanto estas kreita laŭ diaj principoj

La planlingvo Esperanto estis unuafoje prezentita al la mondo en 1887, de la 28-jara lingva geniulo L. Zamenhof (1859-1917), kiu longan parton de sia vivo pasigis en Varsovio.

En prelego en 1956 Martinus eldiras: "Ni vidas ke estas tendencoj evoluigi aliajn lingvojn, lingvojn kiuj ne estas naciaj lingvoj, sed internaciaj lingvoj. Ni vidis idealiston krei mondlingvon,

Esperanto, kiu ludos treege gravan rolon, ĉar ĝi estas kreita laŭ la diaj principoj, ĉar ĝi estas logika, kaj ĉar ĝi estas facile lernebla. Tio ankaŭ estas io kio indikas ke venos alia ekzisto. Ankoraŭ restas la tuta nacia aferaro, ke la lando havas sian propran registaron kaj sian propran rajton je memdecido ktp, sed la religio delonge instruis al ni ke ni ne povas tiel vivi por ni mem, ni devas lerni ami nian proksimulon.” (Prelego 26.01.1956 en Martinus Instituto).

### 5. Kiamaniere la internacia lingvo ricevis la nomon Esperanto?

Zamenhof ofte skribis kontribuojn al la gazetoj uzante diversajn pseŭdonimojn, kiujn li faris ŝanĝante literojn kaj silabojn de sia vera nomo. Unu silabo de lia nomo estas “hof”, kaj germane “hoffen” signifas “esperi”. Eldonante en 1887 la unuan broŝuron pri Esperanto, Zamenhof do uzis la pseŭdonimon D-ro Esperanto. Tial oni komence priparolis ĝin kiel “la lingvo de (doktoro) Esperanto”, “la Esperanto-lingvo”, kaj tio fine tute simple fariĝis la nomo de la lingvo.

### 6. Ĉu Martinus eksplicite montris al Esperanto kiel la estonta monda lingvo?

Martinus ne priparolas Esperanton menciante la nomon en sia ĉefverko, sed en demanda leciono li estis rekte demandita: “Ni ja iam parolos la saman lingvon en la mondo. Kiu lingvo estos tiu?”

Martinus respondas: “Esperanto! – Tiun ni parolos. Ne estas pro tio ke mi estas esperantisto, aŭ ke ĝi estas moda, sed ĉiam pli necesos ke ni havu komunan lingvon. Imagu se oni hodiaŭ havus komunan lingvon! – Tiam oni estus libera pri ĉiuj tiuj tradukoj. Ĉiuj libroj devas esti tradukataj, malofte okazas ke ili gajnas per la tradukado. Tre ofte okazas ke ili iom perdas pro la tradukado. Imagu kiom oni ŝparadus sciante unu saman lingvon. Ĉie ajn homoj povus interparoli. Tio ankaŭ kreus pacon. Nun la militaj pensoj estas grandparte kaŭzataj de tio ke oni ne povas interparoli. La interrilatado kaj la evoluo de amo estos plifaciligitaj kiam ĉiuj povos tute flue interparoli.” (Demanda leciono, Jönköping la 14-an de majo 1969).

En konsilia kunsido en la Instituto de Martinus la 30-an de aprilo 1974 Martinus diris: “Mi kredas ke ni estas iom fruaj pri Esperanto, sed cetere ĝi estas bonega afero. Ĝi venos iam, kaj tio estas grandioza. Sed estos Esperanto. Kiu alia povus esti? Ĉu estas aliaj lingvoj pli progresintaj? Estas neniu lingvo same humana. Oni devas rigardi la kreinton. Li ja estis kolose humana viro. Oni preskaŭ povas vidi ke li estis taskita fari ĝin.” (Samarbejdsstrukturen, [La kunlabora strukturo], par. 6.4).

### 7. La fondinto de Esperanto – Zamenhof

La fondinto de la internacia lingvo Esperanto estis, kiel dirite, Ludoviko Lazaro Zamenhof, kiu dum granda parto de sia vivo estis okulkuracisto en Varsovio. Li estis tre modesta kaj humane evoluinta homo kaj krome lingva geniulo. Al li la rusa estis gepatra lingvo, sed li sciis ankaŭ la jidan, hebrean, grekan, latinan, germanan, francan, anglan, polan, kaj konis ankoraŭ pli da lingvoj. Kiam oni studas liajn vivon kaj sorton, ŝajnas kvazaŭ li estis elektita de la Providenco por plenumi ĉi tiun specialan mision serve al la homaro.

Li naskiĝis en ruslingva, juda familio en la urbo Bjalistoko en Pollando, kiun tiutempe regis fortamane la rusa caro. En la urbo estis poloj, germanoj, rusoj, litovoj kaj judoj, kaj ĉiu el tiuj parolis apartan lingvon. Jam kiel malgranda infano li spertis kiel la patro, kiu estis lingvoinstruisto, helpante per interpretado povis pacigi malkonkordojn kaj disputojn, kiuj ekestis sur la vendoplaco aŭ en la bazaro pro la multaj miskomprenoj inter la komercantoj kun la kvin malsamaj lingvoj. Kiam Zamenhof aĝis kvin jarojn, li ekhavis la ideon fari lingvon kiun ĉiuj homoj povos kompreni, kaj tiu penso lin neniam poste forlasis.

En la lernejo li faris internacian lingvon, *lingwe universale,* kaj ĝian finpretigon en la lasta gimnazia klaso oni celebris en la hejmo decembre 1878, por kio la patrino faris torton al la filo kaj la samklasanoj, kiuj ankaŭ interesiĝis pri la lingvo kaj komprenis ĝin. Studinte medicinon dum du jaroj en Moskvo, li daŭrigis la medicinan studon en 1881 en Varsovio, kie li post kelkjara paŭzo rekomencis la laboron pri la internacia lingvo, kaj dum la sekvaj ses jaroj li ĉiutage forte laboris pri la lingvo apud la studoj kaj la ordinara laboro. Li modifadis kaj plibonigadis la lingvon, poluris ĝin, provadis ĝin per laŭtlegado kaj tradukoj de libroj kaj poemoj. Li skribis tekstojn originale en

Esperanto kaj tiel malkovris ke la lingvo ekhavis sian propran vivon aŭ vivantiĝis en maniero kiun li ne spertis dum tradukado. Pensante kaj skribante en Esperanto, li trovadis solvojn – li diris – kiujn li ne povus elpensi teorie. Ne, eĉ se Esperanto estas planlingvo, ĝi ne estas nura kolekto de malvivaj vortoj.

Kun la permeso de la cara cenzuro li en 1887 en Varsovio publikigis la pretan lingvon en la formo de ruslingva libreto de 40 paĝoj *Internacia lingvo* kun antaŭparolo, klarigoj, ekzemploj, Esperantaj tekstoj (interalie Patro Nia), vortareto de 900 radikoj kaj la plena gramatiko kun la nur 16 gramatikaj reguloj de la lingvo. Samjare tiu *Unua Libro* aperis ankaŭ en la pola kaj franca lingvoj, kaj rapide poste en la germana kaj angla. La informoj en ĉi tiu ĉapitro pri Zamenhof kaj la frua historio de la lingvo estas ĉerpitaj el du libroj, ambaŭ originale verkitaj en Esperanto: Edmond Privat, *Vivo de Zamenhof* (1920) kaj Marjorie Boulton, *Zamenhof* (1962).

## 8. La kosma religieco de Zamenhof

Zamenhof silentis pri sia propra persono, kaj eĉ la homoj plej proksimaj al li ne sciis pri lia religieco. Ili nur spertis lian kondutmanieron, li estis bonkora, pura, modesta, helpema, sindona, mirinde pacienca, li neniam impresis ofenda, ĉu en vortoj ĉu en agoj, kaj ĉiam estis simpatie aŭskultema al ĉiuj homoj. Elstarajn esperantistojn, kiuj eble en periodoj opoziciis lin aŭ kontraŭlaboris Esperanton, li laŭdis en siaj kongresaj paroladoj kaj dankis ilin pro la bonaj klopodoj, kiujn ili malgraŭ ĉio kontribuis al la Esperanta afero. Al ĉiuj homoj – edzino, gefratoj, gefiloj, genevoj, amikoj, pacientoj – li ŝajnis esti sanktulo. En siaj malfacilaj horoj ili ĉiuj venis al li kaj petis lian konsilon.

"Li neniam pekis", diris malnova servistino pola, montrante lian portreton sub ŝia krucifikso sur la muro. Kiom da famuloj restis grandaj en la okuloj de l' servantoj? (Edmond Privat, Vivo de Zamenhof).

Al la malgranda Ludoviko estis same kiel al H.C. Andersen: La patrino estis profunde religiema, kaj la patro estis ateisto. Ambaŭ infanoj komence estis religie tre kredantaj same kiel la patrino, sed iom post iom ili tenis sin pli racie, kaj sekve kritike, al la dogmoj de la katekismo. Ĉe Zamenhof tio evoluis ĝis tio ke li eĉ iĝis ateisto kaj frontis vivkrizon kun spleno, estante 15-16-jara. Kelkajn jarojn poste li sentis sin, verŝajne intuicie, konvinkita pri la senmorteco de la animo kaj la ekzisto de Dio.

Kiam Zamenhof mortis en 1917, 57-jara, li postlasis sur sia skribotablo kvar paĝojn kiuj estis la preparoj de artikolo pri la senmorteco de la animo kaj priskribo de liaj propraj vivpercepto kaj religieco. Kiel dirite, li antaŭe ne parolis pri tio, sed sur la unua paĝo li skribis ke li nun sentas ke li devas fari tion. Li klarigas ke ĉio tio kion li nun skribos, naskiĝis en lia kapo jam antaŭ 40 jaroj, kiam li estis 16-18-jaraĝa. Tiuj pensoj kiujn li havis pri reguleco en la naturo, pri senmorteco kaj Dio, restis esence senŝanĝaj poste.

La tri unuaj paĝoj enhavas enkondukon kun pluraj rezervoj kaj senkulpigoj, ĉar li antaŭvidis ke multaj raciaj esperantistoj ne ŝatos ĉi tiun religian konfeson, eĉ ke la kredantoj ĝin ne ŝatos, ĉar lia percepto estas tute alia ol tiu de la kredantoj. Mortante li estis komencinta nur la kvaran paĝon, kaj tiu teksto finiĝas priskribante la vivokrizon kiun li travivis kiel 15-16-jarulo en sia ateisma periodo. Per tiu enkonduko finiĝas lia religia konfeso. Aparte tamen estis kelkaj notoj pri io nova, kion li travivis kiel 17-jarulo: "Mi eksentis ke eble morto ne estas malapero ...; ke ekzistas iaj leĝoj en la naturo ...; ke io min gardas al alta celo ...".

Lige kun sia laboro pri la internacia lingvo Zamenhof skribis en la frua poemo Mia penso, ke se liaj streboj ne plaĉos al la sorto, li preferos morti. – Imagu, tiel profunde tiu misio de la mondlingvo estis inokulita al la juna L. Zamenhof!

Tiel do ne estis la intenco de la Providenco ke la religia vivpercepto de Zamenhof publikiĝu, sed hodiaŭ ni ja povas konsoli nin per tio ke Martinus priskribis la evoluŝtupojn de la genio kun ĝia intuicia kaj universala percepto de la vivo, la naturo kaj la kosmo: La religia evoluo de Zamenhof de infanaĝo kaj junaĝo ĝis matura aĝo pasis laŭ la sama ordo kiel tiu de la tuthomara evoluo, kiu trapasas unue kred-religian stadion, sekvatan de stadio racia, ateisma kaj materiisma, kaj fine atingas individuan, intuician kaj kosman religiecon.





Zamenhof – la monda lingvo Martinus – la monda moralo

**9. Ĉu la juna Martinus publikigis sian religian percepton?**
En sia libro *Ĉirkaŭ la naskiĝo de mia misio* Martinus skribas, ke lia propra religieco estis sekreto.

Martinus: "Mi estis profunde religiema kaj havis pasian amon al Dio. Mi fizike ne povas memori eĉ unu tagon kiam mi ne preĝis al Dio. Sed tiu mia religieco estis mia sekreto, estis mia sanktaĵo. Jesuo estis mia plej granda idealo kaj gvidanto. Ĉe ĉiu dubo mi ĉiam starigis la demandon jene: kion farus Jesuo en la koncerna situacio? – Kaj la respondo ĉiam venis tuj." (Ĉirkaŭ la naskiĝo de mia misio, ĉap. 13).

Simile al tio Zamenhof iam diris en kongresa parolado al junaj kristanoj: "Mi estas nur hebrea homarano liberkreda; sed kio pli bela en la mondo ol plena sekvado la al la instruo de Jesuo?" (Edmond Privat, Vivo de Zamenhof).

Martinus priskribas per jenaj vortoj la retenemon de evoluintaj homoj rakonti pri sia vivpercepto: "Ĉar la estuloj tie atingis nivelon, kie ili sentas grandan respekton aŭ toleremon al religiaj opinioj kaj konceptoj de aliaj estuloj malgraŭ tio, ke ili ja mem forevoluis de ili, oni neniam aŭdas ilin kritiki aŭ partopreni diskuton, kaj fakte tre malofte tiuj estuloj esprimas sin pri sia propra speciala koncepto pri la vivo krom post insista instigo, kaj nur en okazoj kiam tio eventuale havas la eblecon esti absolute utila." (LB1 par. 123). (Vidu ankaŭ LB5, par. 1875-1883).

**10. Kiel oni povus karakterizi Zamenhofon per la terminoj de la kosmologio?**
Laŭ mia opinio oni povus karakterizo Zamenhofon kiel la evoluintan kaj humanan homon, kiu havas harmonian ekvilibron inter inteligento kaj emocio, kaj kiu posedas grandan saĝon kaj amon. Tiaj homoj, skribas Martinus, estas la plej grandaj praktikantoj de la nova spirita kulturo inter la homaro. (LB1 par. 123).

En LB5 Martinus skribas pri diversaj homtipoj en la evoluo, kaj li listigas ilin laŭalfabete – de A- ĝis K-homo. Lige al la priparolo de Zamenhof la priskribo kongruas kun tiu kion Martinus

skribas pri la H-homo, la humana homtipo. (LB5, par. 1875-1880).

Martinus: “H-homo ĉiam estas tre aktiva kaj produktema. Pri kio li okupiĝas, tio venadas en evoluon kaj kreskon. Ĉi tie nenio restas malzorgita, kaj nenio forperdiĝas. Ĉiu bagatelo iĝas fruktodona en la kre-procezoj aŭ entreprenoj de la estulo. Ĉar la H-homo troviĝas pli-malpli en la aro de la plej evoluintaj homoj de la tero, li havas grandan spiritan intereson. Li fintravivis ĉion kio ekzistas el kreda religieco kaj tial neniel povas fariĝi adepto de dogmoj, sektoj aŭ religiaj komunumoj. La vojo de esplorado estas la sola akceptebla vojo al ĉi tia estulo. Li tial prezentiĝas kiel la absoluta spirita esploranto kaj tie en la plej bona okazo fariĝas kolosa forto, ĉu kiel instruisto, aŭtoro aŭ oratoro. Ĉar lia eminenta kompatkapablo aŭ simpatio ekster la unupolusa seksemo havas neniun kontakton al la cerbo kaj la nedorma dumtaga konscio, kaj tiu tial ne estas sekse karakterizita, ĝi donas al tiu estulo treege grandan senkulpecan gloron aŭ radiadon similan al tiu kiu karakterizas ĉiujn infanetojn, en la mondo de la bestoj same kiel en tiu de la homoj. La H-homo pli-malpli altgrade disradias tiun atmosferon aŭ aŭron kiel ĉiovenkan ĉarmon. Li treege facile gajnas aliajn homojn por siaj ideoj kaj planoj.” (LB5, par. 1880).

## 11. Kio estis la ideo de Zamenhof pri Esperanto?

Zamenhof kreis la internacian lingvon kiel rimedon por atingi celon. Tiu celo estis toleremo kaj kompreniĝo inter la popoloj. La unua kondiĉo por pli granda toleremo, komprenemo kaj amikeco devas esti ke oni entute povu komunikiĝi kaj interparoli. Krom krei la lingvon mem, Zamenhof ankaŭ klopodis por kontribui al la kreo de pli granda humanismo kaj amo inter ĉiuj homoj de la tero, kaj siajn pensojn pri tio li esprimis en sia tiel nomata Homaranismo. Jam de frua tempo estis lia revo krei templon por ĉiuj mondanoj el ĉiuj religioj kaj ellabori komune-homan religion aŭ filozofion, kiu estu logika kaj ama kaj stimulu al vereco, boneco, justeco kaj homeco.

Hodiaŭ estas klare ke la misio de Zamenhof limiĝis al la kreo de la internacia lingvo de la terglobo, kaj la misio de Martinus estis krei la komune-homan kaj universalan religion de la vivo aŭ spiritan sciencon, kiu unuigos ĉiujn homojn de la tero en la sama vero. Kiam Besant parolis pri “la Sinjoro de la Mondaj Religioj”, tiu karakterizo tute ne konformis al Kriŝnamurti, sed ĝi estas tre trafa karakterizo de Martinus. (Vidu par. 2.11).

Krom ke Esperanto estas lingvo kaj ilo de internacia komunikado, oni ankaŭ parolas pri ĝia “interna ideo”. – La interna ideo originas el la humana kaj tolerema intenco de Zamenhof antaŭ la kreo de la lingvo. Deinfanaĝe Zamenhof spertadis kiel poloj, etnaj malplimultoj kaj precipe judoj estis subpremataj de la rusa diktaturo. Egaleco, libereco kaj amikeco estas kelkaj el la ŝlosilaj vortoj de la interna ideo de Esperanto. Tiuj vortoj estas proksimume la samaj – sence kaj forme – kiel la franca slogano: “Liberté, égalité et fraternité” (Libereco, egaleco kaj frateco).

## 12. Esperantistoj estas denaskaj idealistoj

Laŭ Martinus la esperantistoj estas denaskaj idealistoj, ĉar li estis konvinkita ke la plimulto de la tutmondaj esperantistoj estas homoj al kiuj veraj toleremo kaj internacia sinteno estas io kunnaskita. (Kosmos n-ro 1/1939, paĝo 8).




Okaze de la unua kongresa parolado de Zamenhof:
Kion disigis je unu miljaro
Tion kunigis Bulonjo ĉe l' maro
Augusto 1905, L. Zamenhof
Manskribita poemo de Zamenhof sur la bildo,
kiu montras foton de la fama organizinto
Michaux kaj d-ro Zamenhof.

## Libera Artisto de Tatjana Auderskaja

La 20-an de majo, 1898 naskiĝis Nikolaj Vasiljeviĉc Blaĵkov; skulptisto, pedagogo, esperantisto.

Tiun homon memoras multaj. La monumento al L. Zamenhof, kreita de li, longe restis la sola sur la teritorio de Sovetunio. Ĝi staras ĝis nun en tipe odesa korteto ĉe la strato Deribasovskaja, la ĉefa strato de nia urbo.

Multaj esperantistoj scias pri i; Hugo Röllinger notis ĝin en sia libro *Monumente pri Esperanto*. Al Odeso ofte venadis gastoj, kaj ĉiam ni kune omaĝis la Majstron apud lia monumento.

En 1998 en Odessa okazis SAT-Kongreso; tiam nia junulara klubo renovigis la monumenton, deskrapante de ĝi kelkdekjarajn tavolojn da farbo kaj koto. Ni purigis ĝin ĝis la betona bazo; kaj tute hazarde nian laboron tie filmis germana televido. La filmon oni vidis, krom Germanio, ankaŭ en Pollando kaj Francio; kaj en 2002 nia klubo mem kreis filmon pri Odessa, kie honora loko estas disponigita al nia fama monumento.

Sed kiu kreis ĝin? – Sur la piedestalo de la busto estas skribite: "Kreinto de Esperanto". Sed kion ni scias pri la kreinto de la monumento? – Starante antaŭ nia Kontraŭspiona Armea Departemento (SMERŜ) en 1945, tiu persono al la demando pri socia stato fiere respondis: "Libera artisto!".

Jes, sian tutan vivon li estis libera. Libera anime. Kaj tiun liberon, liberemon li scipovis transdoni al siaj lernantoj, al tiu junularo, infanaro, kiu ĉiam apudis lin. Libereco estis lia natura stato, kaj ni simple enspiris tiun aeron de libero, kaj tiel edukiĝis. Mi estis lia lernantino.

Nikolaj Vasiljeviĉ Blaĵkov naskiĝis la 20-an de majo 1898 en Odessa. Lia patro estis ŝtabskapitano de artilerio. En 1917 Nikolao finis gimnazian kurson kaj devis serĉi sian lokon en la vivo. Li eklaboris en popola muzeo kiel gardisto. Tia estis lia unua proksima kontakto kun la arto. Poste li ekmastris la profesion de skulpta modlisto en porcelana fabriko, kaj daŭrigis lernadon de skulpta arto en la fama Stroganov-lernejo.

En 1920 li konatiĝis kun la doktrino de Lev Tolstoj, kiu kongruis kun lia pensmaniero, kaj dum la tuta vivo sekvis ĝiajn principojn. Dum juĝenketado en 1945 li diris: "Mi estas kontraŭ plenpova ŝtata potenco kaj ajna perforto: arestoj, prizonoj, trudlaboroj; mi estas kontraŭ militservo, mi estas por suvereneco de popoloj, internacia kulturo kaj la internacia lingvo Esperanto. Mi estas kontraŭ ajna politika partio".

Sekvante siajn principojn, Blaĵkov ne partoprenis la Civilan militon en RSFSR: li forkuris de mobilizo en la Blankan Armeon, sed militservon en la Ruĝa Armeo li evitis oficiale: la juĝejo permesis al li anstataŭigi ĝin per instruista laboro en vilaĝo.

En la 20-30-aj jaroj, post fino de la studado en Stroganovka, N. V. Blaĵkov partoprenis artajn ekspoziciojn kiel skulptisto. En tiuj jaroj komenciĝis ankaŭ lia lernado de Esperanto, kiu ĝis la lasta momento estis, samgrave kiel skulptoarto, la ĉefa afero de lia vivo.

En junio 1941 li estis mobilizita al la Ruĝa Armeo por defendi nian Patrujon de nazioj. La principoj de neperforto de Tolstoj ne malhelpis al li partopreni en tiu justa batalo. Tamen li ne mortigis homojn. Blaĵkov servis kiel topografo en la stabo de la 9-a popolarmea divizio je la nomo de S. M. Kirov.

La 12-an de oktobro 1941 la staba aŭto estis pribombita; la transvivintaj stabanoj sin kaŝis en arbaro, sed estis kaptitaj de malamikoj. Komenciĝis suferoj de Blaĵkov en koncentrejoj por militkaptitoj.

En la koncentrejo Blaĵkov organizis ceramikan metiejon, kie li instruis modladon al la militkaptitoj, savante ilin tiamaniere de pezega trudlaboro. El argilo, el ligno li faris portretojn de samsortanoj. Pri la ceramikisto kaj skulptisto el la koncentrejo eksciis la posedanto de la ceramikejo, la pentristo Vitold Braĵĝis el la litova urbo Alitus, kie troviĝis la koncentrejo. Li petis la estraron lasi la bonan skulptiston labori en lia metiejo.

Ĝis la fino de sia vivo memoris N.V. tiun litovon, kiu ebligis al li spiri relative libere en tiu terura tempo. Sed la estraro priatentis Blaĵkov, kaj post juĝesploro transigis lin al koncentrejo en Kaunas kun pli severaj kondiĉoj. Tie Blaĵkov restis ĝis majo 1944, kiam lin denove arestis la gestapo. Tio okazis la 20-an de majo 1944, ĝuste en lia naskiĝtago. Unu monaton li pasigis en gestapaj karceroj, kaj fine de junio estis sendita al la organizaĵo "VENETA". Ĝi troviĝis en la kastelo Jablonovo, kie estis kolektitaj kleruloj kaj artistoj el la okupitaj regionoj de USSR. Tie N. V. devis ĉizi el ligno kapojn por pupoj, destinitaj por infanoj de "ostarbajter", kaptitaj popolanoj, kiuj sklave laboris ĉe germanaj mastroj.



Sed vera ĉefverko lia estis la busto de Ludoviko Zamenhof, kiu longe estis la sola monumento al Zamenhof sur la teritorio de Sovetunio. – En 1961 en Odeson venis granda delegacio de esperantistoj el Varna, nia ĝemelurbo en Bulgario. La delegacio donacis al la odesaj esperantistoj broditan standardon kun la subskribo: "Al esperantistoj de Odeso en signo de frata amikeco. 1961". Tiam, por reciproki la gastojn, odesanoj decidis donaci al ili la buston de Zamenhof! Sekvajare la busto estis preta. Oni supozas, ke estis faritaj 2 monumentoj. Unu restis en Odeso, kaj estis metita en la korto de la domo n-ro 3 en la Deribasovskaja strato, kie loĝis tiam Blaĵkov. Kie estas la alia, nun scias neniu.

Dum la tuta vivo NV. agis propravole kaj neoficiale. Li instruis Esperanton; li instruis skulptoarton. Sed por ni ĉiuj li estis Instruisto de la Vivo. Li estis bonkora kaj saĝa persono; al li oni povis veni kun siaj demandoj, rakonti pri mal ĝojo aŭ feliĉo, ekscii novaĵojn el la arto aŭ el la Esperanto movado; aŭ simple sidi, kontemplante la laboron de la Majstro, kiam l i kreis proprajn skulptaĵojn. Homo de eksterordinara anima riĉeco, li ĉion dividis kun infanoj; en siaj 70 jaroj li parolis kun ni kiel kun egalaj al li mem; kaj tio estas tre grava por junulo, komencanta la vivon. Lia rondeto estis "loko, kien oni povas veni", kiel diris Dostojevskij. En la lupa mondo infanojn oni devas eduki ne kiel lupojn, kaj ne kiel predojn por lupoj, humilajn ŝafojn. Oni devas doni al ili fortojn esti *aliaj*, kaj al la forto de krueleco kontraŭmeti la forton de bono. Tiun grandegan forton de bono kaj bonkoreco havis N.V.; kaj li dividis ĝin kun ni. Li bone sciis, ke nur la bono estas eterna, kaj senmorta estas nur tiu, kiu kreas kaj donas.

Dum lia entombigo kaj rememora kunmanĝo neniu tristis. Ekslernantoj de li ridis, kantis. – Ja Nikolaj Vasiljeviĉne mortis! – Al ĉiu el ni li donis ion, kio restis por ĉiam: profesion, scion, memcertecon, malfermis la mondon de arto, de kreado, la vastan mondon de Esperanto kun ĝia grandega humanista ideo de unueco de la homaro kaj samrajteco de ĉiuj popoloj. La "Interna ideo" de Esperanto restas unu el la plej noblaj ideoj, iam kreitaj de la homaro.

Nikolaj Vasiljeviĉestis homo de estonteco. Ankaŭ tial li ne mortis. Li vivas en siaj lernantoj. Mi diris, ke li instruis nin. Nu, pli gravas, ke li simple vivis kaj laboris apud ni.

Ĉiu homo bezonas komence de sia vivo "Instruiston", kiu helpos al li trovi sian vivovojon. Kaj mi ĝojas, ke mia Instruisto en la vivo estis Nikolaj Vasiljeviĉ Blaĵkov.

Tio vere estas tre alta spirita komunumo, kiun ne ĉiu povas eniri. Veran egalrajtecon ne ĉiu povas elteni. La plimulto agnoskas nur perforton aŭ nur humilecon, kaj egaleco estas netolerebla por ili. Sed Esperanto temas pri egaleco en la plej alta senco de la vorto.
Laŭ permeso de revuo Esperanto (n-ro 7, 2023)

## Informado pri la Martinus-instituto

La mondbildo de Martinus estas logika analizo de la spiritaj leĝoj kaj principoj de la vivo. La nova mondbildo estas studebla per la libroj de Martinus, kiuj eldoniĝas de la Martinus-Instituto, kaj per prelegoj, kursoj, studrondoj kaj informoj en la interreto. Okazas aktivecoj en la Martinus-Instituto en Kopenhago, en la Martinus-Centro en Klint ĉe Nykøbing Sjælland, en aliaj lokoj en Danio kaj eksterlande. Pliajn informojn oni ricevas kontaktante la Martinus-Instituton.
La disvastiĝo de la konoj pri la Kosmologio de Martinus okazas sen ia formo de membreco aŭ kreado de asocio.

Eldonanto: Martinus-Instituto Mariendalsvej 94-96
DK-2000 Kopenhago
Tel: (+45) 3838 0100 Telefontempo: lundo-ĵaŭdo 12-16 DK p.ĝiro 642-9580
www.martinus.dk, esperanto@martinus.dk, shop.martinus.dk
Redakcio: Ole Therkelsen. Kompostado: Jonas Dalmose.

Kopirajto: © Martinus Institut Redono de teksto nur laŭ skriba permeso.
Presita de Martinus Institut ISSN 1600 4116.



## SENPAGA EO-KOSMOS

Senpage, du fojojn jare (en marto kaj oktobro) Eo-Kosmos publikiĝos en elŝutebla formato ĉe la adreso: www.martinus.dk/eo.
Rete kaj retpoŝte vi ankaŭ senpage povos aboni Eo-Kosmos kiel alkroĉitan pdf-dosieron kaj epub-libron.
Sendu vian peton al la Eo-adreso de Martinus-Instituto: esperanto@martinus.dk.

Martinus-Instituto
Mairendalsvej 94-96,
DK-2000 Frederiksberg,
Kopenhago,
Danio